


Bulgara Esperantisto

Novembro 1989



ENHAVO

- 2 Ĉu ĝi ekzistas? (Georgi Miĥalkov)
- 4 El mia teatra sperto (Belka Beleva)
- 7 En IEK — Pisanica (Libertaria Mladenova, A. Bâčva-rov)
- 9 Ĝuo kaj seriozeco (Cvetanka Uzunova)
- 11 Pri la veteranaj esperantistoj (Nikola Aleksiev)
- 12 Poeto de proleta optimismo (Ĥristo Gorov)
- 16 Bulgaraj memoraĵoj (Lilija Koleva)
- 18 Agrablaj travivaĵoj (N. N., Zora Oŝanska, Cveta Popova)
- 21 Al la verkemuloj (Venelin Mitev)
- 23 Lingvo de popola diplomatio (N. Krasjuk, Stefan Georgiev, Michael Behr)
- 25 Lingvaj demandoj (Violin Oljanov, Dimitâr Haĝiev)
- 26 Vanga (Krasimira Stojanova)
- 29 Enlanda movado
- 32 Deziras korespondi
- III Distroj

Ĉefredaktoro: Maria JANKOVA

Redaktoroj: Evĝeni GEORGIEV kaj Rumjana GEORGIEVA

Redakcia konsilantaro: Dimitâr HAĜIEV, Krâstju KARUCIN, Kunĉo VÂLEV, Nikola NIKOLOV, Venelin MITEV

Adreso de la redakcio: „Ĥristo Botev“ 97, 1303 Sofio, Bulgario, tel. 22-80-86

Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“ — bul. „Lenin“ 117, 1113 Sofio

Al la kunlaborantoj: Kontribuaĵojn por la koncerna numero ni akceptas du monatojn antaŭe. La materialoj devas esti koncizaj kaj konkretaj, verkitaj nur en Esperanto, tajpitaj aŭ klare skribitaj. Por publikigo sendu bonkvalitajn fotojn. La Redakcio ne resendas manuskriptojn kaj fotojn.

Abonkondiĉoj: En Bulgario „Bulgara Esperantisto“ estas abonebla per la poŝto, kontraŭ 4.80 lv. En ĉiuj socialismaj landoj — per la koncerna poŝto. Por aliaj landoj — pere de UEA aŭ per niaj perantoj, kontraŭ 32 nederlandaj guldenoj aŭ egalvaloro en nacia valuto. La abonprezo por socialismaj landoj en Bulgario estas 7.32 lv., por la ceteraj landoj — 7.80 lv. Prezo de unuopa ekzemplero — 0.50 lv. aŭ 3 ned. gld.

„Bulgara Esperantisto“ havas abonantojn en 47 landoj.

Estas organizita regula surbendigo de „Bulgara Esperantisto“ por la bezonoj de la blindaj esperantistoj.

Sur la unua kovrilpaĝo: Turista E-grupo „Gajaj migrantoj“ sur monto Vitoŝa.

Foto: Ivan IVANOV

BRITIO

S-ro Paul Hewitt, 26 Highfield Road, North Thoresby, Great Grimsby, SOUTH HUMBERSIDE DN36 5RT

FRANCIO

S-ro Joseph Barre, 10, Rue du Senat, F-44300, NANTES.

Union Francaise pour L'Esperanto, 4 Bis, Rue de la Cerisaie, 75004, PARIS

JAPANIO

S-ro Yoshiaki Mizuno, Hanazono 1-2418-18, TOKOROZAWA, 359

JUGOSLAVIO

Zoran Murgovski, ul. „Dame Gruev“ 65, 96000 OHRID

MEKSIKIO

S-ino Leonora Torrez T., Playa Hornos 575, COL. MARTE, 08830 MEXICO DF.

S-ro Enrique Lemus, Insurgentes Sur 3493, Villa Olimpica, Edif. 27.001, 14020 MEXICO DF.

PORTUGALIO

Portugala Esperanto-Asocio, R. DR. Joao Couto, 6, R/C A., P — 1500, LISBOA

SVEDIO

Sveda Esperanto-Federacio c/o Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl 455 S-242 94, HÖRBY

SVISLANDO

Esperanto-Perantejo, Weingartstr. 21, CH — 3014 BERN

SUD-AFRIKO

S-ro C. S. Beckford, P. O. Box 1227, CAPE TOWN, 8000

USONO

Esperanto league, For North America. Inc., P. O. Box 1129, EL CERRITO, CA 95430

Ĉiu deziranto estiĝi peranto de „BE“ eksterlande povus turni sin al la Redakcio. La rabato por la perantoj estas 25% de la kolektita abonsumo kaj ili ricevas la revuon senpage.

Jaro 58

N-ro 11

Bulgara Esperantisto

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO, FONDITA EN 1919, DISTINGITA PER ORDENO „KIRIL I METODIJ” — I GRADO

ESPERANTA KULTURO KAJ AMATORA ARTO

Estimataj legantoj,

En kajero 6/1989 de „Bulgara Esperantisto” ni anoncis anticipe la temon de tiu numero, invitante vin vigele „konversacii” sur la revuaj paĝoj pri Esperanta kulturo kaj amatora arto.

Per tiu temo ni starigis du gravajn demandojn:

- Unue, pri ofte diskutata en esperantistaj kaj neesperantistaj medioj problemoj ĉu la E-kulturo estas realaĵo, vera valorado en la trezorujo de la tuthomara kulturo?

- Kaj due, kiel vi pritaksas la amatoran arton, prezentatan en Esperanto.

Pri tiu aspekto de la numera temo ni deziris instigi vin dividi viajn konkretajn opiniojn, imagojn, rimarkojn kaj sugestojn rilate al BEA-iniciatoj — nome revuoj pri E-kanto kaj parolo kaj kanto, konkursoj-recitaloj k. a.

Ĉar la Esperanto-kulturo kaj ĝia ero — amatora arto, estas fakte konkreta manifestado de la Lingvo Internacia kaj samtempe motoro por disvolvo kaj disvastigo de la movado esperantista, ni donas frontan lokon al ĉi-numera temo komencante jam per la ĉefartikolo.

La Redakcio dankas al ĉiuj, kiuj partoprenis la diskuton per siaj kontribuadoj.

„BE”



ĈU ĜI EKZISTAS?

Georgi MIĤALKOV

Esperanta kulturo — ĉu ĝi ekzistas aŭ ne? La esperantistoj ofte starigis tiun ĉi demandon. Multaj el ili estas firme konvinkitaj, ke Esperanta kulturo ekzistas, ke dum jarcento en Esperanto estas kreita riĉa originala literaturo, abundas valoraj tradukoj, ne mankas same teatraj, eĉ muzikaj prezentoj kaj tio formas originalan, kvankam nekutiman kulturon, kiu tamen jam estas ero de la vasta monda kulturo.

La reprezentantoj de la alia tendaro provas konvinki nin, ke Esperanto estas nur ilo, nur lingvo, kiun parolas homoj el diversaj popoloj kaj nacioj, kiuj, malgraŭ la ekzistantaj literaturaj kaj teatraj verkoj en Esperanto, ne povas formi memstaran kulturon, ĉar mankas kulturaj tradicioj, mankas unueca homgrupo, kies komuna historio kaj etna evoluo povus krei memstaran kulturon.

Laŭ mi en la lastaj asertoj ne mankas logiko, sed ŝajne ili pravas rilate la unuan periodon de la evoluo kaj disvastigo de Esperanto-movado. Tiam, malgraŭ ke de la komenco estis kreitaj originalaj literaturaj verkoj en Esperanto, ni ankoraŭ ne povas paroli pri apero de Esperanta kulturo, ĉar fakte la unuajn literaturajn verkojn kreis esperantistoj el diversaj landoj kaj la sola komuna trajto de tiuj ĉi verkoj estis la lingvo Esperanto. Tamen jam en la unuaj Esperanto-verkoj ekaperis la originala kerno de la estonta Esperanta kulturo, nome, ke la Lingvo Internacia celas solvi ne nur la mondan lingvan problemon, sed la plej nobla ĝia celo estas la paco kaj amikeco inter la homoj kaj tiu ĉi ĉefa ideo estis brile esprimita jam en la fruaj Esperanto-verkoj.

Iom post iom tiu ĉi ideo fariĝis gvida en la Esperanta literaturo kaj nun la ĉefa trajto de nia literaturo estas ĝia internaciismo.

Kiel ĉe ĉiuj nacioj, la kulturo formiĝas malrapide kaj necesas la streĉoj de multaj generacioj. Same la Esperanta kulturo bezonas la kontribuon de pluraj generacioj, sed sendube ĝiaj

fundamentoj jam estas firme starigitaj. Post la unuaj nekuraĝaj provoj de la Esperanto-pioniroj, inter kiuj estis talentaj poetoj, verkistoj, artistoj, eĉ kantistoj, venis la dua generacio, kiu jam havis la necesajn ekzemplojn kaj modelojn. Ni ankoraŭ ne sufiĉe bone esploris la vojon, la formiĝon de la Esperanta kulturo, sed ŝajnas al mi, ke ĝi sekvas la naturan evoluon de ĉiuj naciaj kulturoj.

Pro la fakto, ke Esperanto naskiĝis en Eŭropo kaj pli ĝuste en la slavaj regionoj de Eŭropo, ĝia kulturo, pli precize ĝia literaturo unue estis forte influata de la riĉa slava literaturo — rusa kaj pola (Zamenhof, Grabowski, Kabe, Devjatn). Tio nur helpis la junan Esperantan literaturon, kulturon. Poste venis la influo de la franca literaturo, dank' al la talentaj verkoj de kelkaj francdevenaj esperantistoj.

Iom post iom nia literaturo liberiĝis de la influoj kaj en ĝi eksonis tute originalaj voĉoj, kiuj alportis originalajn motivojn kaj ideojn.

La dua generacio de la Esperantaj kreintoj jam havis la malfacilan, sed noblan taskon formi la veran vizaĝon de nia literaturo kaj prepari la grundon, sur kiu poste devas elkreski kaj ekflori la bela arbeto de la Esperanta kulturo. Grandega estis la rolo de Kalocsay kaj Baghy, kaj malgraŭ ke ili alportis la influon de la hungara literaturo kaj kulturo, ili tamen formis la unuajn trajtojn de la nova Esperanta kulturo. Laŭ mi ili estas la unuaj veraj kreintoj de nia kulturo, ĉar ili daŭrigis la laboron de Zamenhof, Grabowski, Kabe kaj formis la tradicion en la Esperanta kulturo.

Nun ni ne povas imagi la eminentajn tradukojn de Kalocsay kaj liajn originalajn poemojn, se ne ekzistis la modelaj tradukoj de Grabowski. Ni ne povas imagi la allogan prozan stilon de Julio Baghy, se li ne konis la tradukojn de Kabe aŭ pli ĝuste la klasikan tradukon de „Faraono“.

Kalocsay kaj Baghy fidelis al la tradicio kaj daŭrigis la tradicion. Kalocsay dum mallonga tempo prilaboris la Esperantan poetikon kaj donis brilajn

modelojn de Esperantaj sonetoj, baladoj, rondeloj. Baghy kreis la unuajn verajn Esperanto-romanojn. Eĉ en lia krestomatia „Verda koro” rolas esperantistoj, kiuj malgraŭ iom flanke tamen esprimas Esperantajn problemojn.

Post la Dua Mondmilito sur la firmamento de nia Esperanta kulturo aperas novaj kreintoj, daŭrigantaj la laboron de siaj antaŭuloj kaj instruistoj. Nun eble William Auld ne estus tiel forte ligita al la Esperanta kulturo, se ne ekzistus la literatura agado de Kalocsay kaj Eŭgeno Mihalski, aŭ Marjorie Boulton kaj Eli Urbanová ne povus enpenetri profunde en la maltrankvilan inan animon, se antaŭ ili ne estus la teneraj inaj poemoj de Hilda Dresen.

Tamen kiam ni parolas pri la Esperanta kulturo ni ne devas pensi, ke ĝi estas tute fermita kaj memstara. Tiu ĉi kulturo apartenas al la plej larĝe malfermitaj mondaj kulturoj, ĉar ĝiaj kreintoj estas reprezentantoj de diversaj popoloj kaj nacioj, kaj malgraŭ ke ili vole aŭ nevole sekvas la tradiciojn de nia juna kulturo, ili enportas en ĝin la motivojn, la elementojn de siaj propraj naciaj kulturoj, tial en la Esperanta literaturo ni rimarkas hispanajn, brazilajn, japanajn motivojn.

Nia Esperanta kulturo ankoraŭ estas tro juna, sed laŭ mi, ĝi rapide evoluas kaj tion atestas ne nur ĝia sufiĉe riĉa literaturo, sed ĝia teatro, ĝia pupteatro, ĝia muziko. Ni nur povas bedaŭri, ke ni ankoraŭ ne havas ampleksajn literaturajn revuojn, pli stabilajn libroeldonejojn, konstantajn teatrojn, filmojn, pli vastajn radio-kaj televidelsendojn kaj kompreneble lernejojn, en kiuj la Esperantaj kulturaj valoroj edukus la junajn esperantistojn je internaciismo, homamo kaj la forta deziro al la tutmonda paco.

Tamen la juna Esperanta kulturo ekzistas kaj tion pravas la kongresoj, la festivaloj, la naciaj revuoj de Esperantaj kanto kaj parolo. Ĉi-jare mi partoprenis kiel ĵuriano de Nacia Revuo de Esperantaj Kanto kaj Parolo en urbo Stara Zagora, kie ravis min la entuziasmo, la fervoro de la multnombraj junaj partoprenantoj. Ili recitis poemojn de la plej elstaraj nuntempaj Esperantaj poetoj, ili kantis vere belegajn kaj originalajn Esperanto-kantojn kaj tio montris, ke la Esperanta kulturo ne nur ekzistas kaj vivas en ili, sed ili mem estas unu el la kreintoj de tiu ĉi kulturo. Kaj nevole mi pensis, ke kulturo, kiu eniris kaj flamigis la junajn korojn ne povas malaperi, ĝi vere ekzistas kaj ekzistos.



EL MIA TEATRA SPERTO

Ĉu ni rajtas paroli pri Esperanta kulturo, pri kulturo kreita, realigita per lingvo Esperanto — tio estas difino, kiu vere meritas esti pridiskutata fare de specialistoj.

Tamen ni, la anoj de la tutmonda Esperanto-movado, konas la atingojn de la belarta kreado, la atingojn de la scienco, esprimataj per la Internacia Lingvo. Por ni jam ne ekzistas similaj demandoj: ĉu oni povas esprimi la plej tenerajn homajn sentojn per Esperanto, ĉar ni konas la originalan verkaron de Zamenhof, de Kalmán Kalocsay, de Marjorie Boulton, de Asen Grigorov, de Simeon Simeonov; ĉu lingvo Esperanto disponas pri vortaro, taŭga por alt-nivelaj tradukoj, ĉar la tradukitaj versoj de Dante radias senmortecon kiel la originalaj, la humanismaj revoj de Don Quijote havas sian realigon ankaŭ en Esperanto, la Sonetoj de Ŝekspiro parolas pri amo, pri saĝeco per la arta traduko de William Auld; ĉar ni povas rakonti al la mondo pri Botev per la versoj: „Ja kiu falas por la libero, mortas neniam!” Oni prezentas teatraĵojn sur la scenejo en Esperanto, oni kantas popolkantojn, ariojn kaj kanzonojn en Esperanto.

La fakto, ke la Esperanto-movado en Bulgario havas profundajn radikojn jam en la komencaj jaroj de la Internacia Lingvo, ke ĝi travivis sukcesojn kaj streĉecon dum sia ekzistado, atestas pri la sindona laboro, pri la elkora amo al ĉio, kion ni nomas Esperanto. Pro tio, la atingiĝoj ankaŭ en la kultura agado estas vere grandaj kaj eĉ imponaj.

El tiu ĉi riĉega kultura agado mi dezirus tuŝi mian plej proksiman temon: la Esperanta teatra parolo.

Per Bulgara Esperanto-Teatro ĝi vivas sur la teatra scenejo jam 30 jarojn, emocias la publikon, sonas bele. Per ĝi la internacia esperantistaro ekkonis la komediojn de Vazov, St. L. Kostov, J. Jovkov, P. Panĉev, la rakontojn de Elin Pelin, de A. Karalijĉev. Bulgaraj reĝisoroj kaj aktoroj — sindonaj esperantistoj — prezentas, recitas en kunvenoj, festivaloj kaj en kongresoj.

Julio Baghy: „La aktora trupo plenmerite ricevis aplaŭdojn post ĉiu sceno, ĉar ĉiuj plenumantoj aldonis per sia bona rolado al tiu arta unueco, kiun bezonas ĉiu Ŝekspira

teatraĵo, por rikolti sukceson en nia moderna epoko.” (1963)

Prof. Waringhien: „La ludo de la geaktoroj estis sufiĉe rimarkinda... Tiu ĉi prezentaĵo restos neforgesebla evento en la vivo de la esperantistaro.” (1963)

Aldo de Giorgi: „Kion diri komente? Eble ke BET ne dementis sian tridekjaran famon: la enscenigo estis akurata, dignonivela la aktorado, klara la esperanta prononcado... Ni aplaŭdu do al nia BET kaj atendu kun scivolo la venontajn enscenigojn”. (1988)

Fakte, la bonaj vortoj de la publiko venas post la prezentita sur la scenejo spektaklo, post la festa renkontiĝo kun la spektantoj. Post mi, tamen, la antaŭa preparlaboro dum provludoj kaj individuaj pritaksoj, dum la „plejmaĉado” de la Esperanta teksto ĝis eltrovo de plej vera situacio de la sceneja ago, de la plej interesa karaktero de la prezentita heroo, de la plej belsona eldiro — jen la dolĉa kaj amara parto de tiu kreado. Dum tiuj ĉi streĉaj horoj la esperantisto-aktoro multe lernas la lingvon Esperanto. Ĉar la teatra ago estas ĉerpita el la vivo mem, ĉar la teatraj herooj estas homoj kun digno aŭ malhonoro, ĉar ili parolas homajn vortojn.

Mia propra sperto pruvis, ke mi ellernis lingvon Esperanto pli rapide, pli riĉe per mia aktorado, ol per lernokurso (kompreneble post studado de fundamentaj reguloj).

Esperanto estas la lingvo, kiu proponas al ni kontakton per viva parolo, kiu interligas la homojn. Mi ne esceptas la eblon, kiun Esperanto havigas al ni — konatigi nin kun tradukita kaj precipe kun originala literaturo en ĉiuj ĝiaj branĉoj — arta kaj scienca. Tamen la fundamenta celo, aplikita jam de la kreinto de la lingvo, valida ĝis la hodiaŭa tago, estas la viva konversacia formo.

Ĝuste pro tio mi opinias, ke la uzado de la dramaturgia formo en la instruado de Esperanto estas celkonforma. Oni povas uzi ĉiujn ĝiajn formojn: dialogoj, mallongaj teatraĵetoj, unuaktaj kaj pluraktaj. Dum la studado de la teatraĵoj oni nerimarkeble pliriĉigas la vortaron, uzante apartajn vortojn, tutajn esprimojn kiel niajn proprajn. La saman fenomenon mi rimarkis ankaŭ ĉe esperantistoj, kiuj ne estas profesiaj akto-



BET-anoj, kiuj surscenigis la komedion „La milionulo” de Jordan Jovkov — 1984.

Foto: Boris ANEV

roj: kaj gejunuloj, kaj pli aĝaj personoj. Okaze de diversaj festaj aranĝoj ili prezentas siajn amatorajn teatrajn spektaklojn. Post la unuaj provludoj ili komencas paroli per la replikoj el la teatraĵo mem. Ni ĉiuj scias, kia granda intereso, agrabla travivaĵo kaj rezultodona laboro estas la studado kaj prezentado de teatraj formoj. Ŝajne facila, amuza formo, tamen utila. Pro tio, ke la dramaturgio enhavas konfliktojn, kiuj provokas agon, la parolmaniero estiĝas aktiva kaj celdirektita. La studado de teatraj formoj alportas al la plenumantoj ankaŭ alian utilon — alkutimiĝo elparoli la tekston precize, gramatike senerare, kompreneble.

Majstroj de originala Esperanta literaturo — prozo kaj poezio — estis eksentintaj naturan impulson krei kaj traduki ankaŭ teatraĵojn: Zamenhof mem, Grabowski, K. Kalocsay, Julio Baghy, M. Boulton, W. Auld kaj nuntempe Spomenka Ŝtimec, Stefan MacGill k. a. Ne hazarde ekzistas speciala komisiono por prijuĝo de la plej bonaj originale verkitaj en Esperanto dramaj verkoj. BET jam renkontiĝis kun „Ni vivos” de Georgi Miĥalkov kaj nun — kun „Lanĉo” de Emilija Lapenna.

Jam sur la unuaj paĝoj de Esperanto-lerolibroj troviĝas mallongaj prozaj rakontoj. Ilia amplekso estas pli rezultodona, se oni eltirus el ilia enhavo la replikojn de la herooj, per kiuj ili formas la konversacion. Kaj

tuj kelkaj el la kursanoj partoprenos la dialogon. La teksto de la rakonto ekvivigos estiĝos konversacia.

La historio de la Esperanto-movado montras al ni multajn ekzemplojn:

Sian bapton lingvo Esperanto ricevis en 1887, kiam okazis la unua konversacio inter Zamenhof kaj Grabowski. Do, fundamenta dramaturgia formo — dialogo — vivigis la lingvon internacian.

La unua teatra prezentado en Esperanto okazis la 7-an de septembro 1896 en Smolensk, Rusio, kie junaj esperantistoj ludis la komedion „Unua brandfaristo” de L. N. Tolstoj, traduko de V. Burenkov.

Dum la Unua Universala Kongreso en Boulogne-sur-Mer estis prezentita unue la unuakta komedio „Mensogo pro amo” de Labiche. „La sekvantan tagon okazis granda Esperanto-koncerto, dum kiu oni ludis la unuan grandan komedion, tradukitan en Esperanton „Edziĝo kontraŭvola” de Molière. Partoprenis sep diversnaciaj amatoroj”. (Enciklopedio de Esperanto, 1979, p. 60).

La komenco estis jam farita, poste sekvis entuziasmigitaj eksperimentoj, celantaj plifortigon kaj disvastigon de la Internacia Lingvo. Per la senmorta teatra arto pliriĉiĝis unu branĉo de la Esperanta kulturo.

Belka BELEVA

POR DISFLORIĜO DE NIA ARTO

Jam multajn jarojn la arto de la esperantistaj profesiaj kaj amatoraj aktoroj, kantistoj, aŭtoroj faras rimarkindan propagandon de la Internacia Lingvo. Esperanto-konzertoj, revuoj kaj festivaloj donis eblecon al ĉiuj dezirantoj demonstri sian talenton antaŭ esperantista kaj neesperantista publiko.

Sendube dank' al la klopodoj de BEA — estraro, per kontaktoj kun ĵurnalistoj el la gazetaro, radio kaj televido Esperanto gajnis multajn amikojn en la publikaj kulturaj medioj. La sukcesoj jam estas fakto, sed problemoj ankaŭ ne mankas.

En Sofio funkcias Centra E-Kulturdomo ĉe la Komisiono pri Kultura Agado de BEA, kiu fakte ne havas ejon. Krom la ĥoro de la sofiaj esperantistoj ĉe la Kulturdomo ne ekzistas alia amatora artgrupo.

Niaj kulturaranĝoj ofte pasas sen bone pripensita scenaro, ĝis la lasta momento ni atendas plenumantojn, por ke la programo

komencu, toleras malaltan nivelon de la plenumoj — precipe de la lernantoj. Ni invitas specialistojn nur kiel membrojn de ĵurio aŭ por kunsidoj de la Komisiono, iuj partoprenas en koncertoj, sed neniu gvidas esperantistan amatoran grupon, krome la estrino de la Sofia E-Ĥoro. Laŭ ni oni devas pensi pri la malgranda teatra ejo, ekz. pri kafoteatro. Tie oni provludos, renkontiĝos plenumantoj. Tiu ejo transformiĝos en centron de nia sursceneja arto: amatora kaj profesia.

Kial ni ne proponas al niaj aktoroj turneojn tra la lando, ĉar prepari kaj prezenti E-programon nur foje estas afero sen-senca.

Mi opinias, ke ni havas forton kaj eblecon fari ankoraŭ multon por la disvastiĝo kaj disfloro de nia E-kulturo.

Nevjana KRĀSTEVA,
membro de Komisiono pri Kultura Agado ĉe
BEA

Temo de la numero 3/1990

La E-turismo — jen temo, kiu certe interesas la plimulton el vi, karaj gelegantoj.

La turismo, samkiel la amo, ne konas aĝlimojn. Kaj junuloj, kaj maljunuloj ŝatas migri, ekskursi, vojaĝi por ĝui parteton de la naturo, por ekkoni novajn lokojn, por „mal-kovri“ por si fremdajn landojn, por konatiĝi kun diversaj homoj...

Unu el la avantaĝoj de Esperanto estas, ke pere de ĝi eĉ en plej fora lando oni povas senti sin hejmece. El via propra sperto vi certe rakontos ankaŭ pri aliaj specifaĵoj de la E-turismo. Sendube la malpli spertaj E-turistoj jam scivolas pri la rakontoj de spertuloj.

Ni esperas ricevi aron da interesegeaj kontribuadoj. Ne atendu la limdaton — la 1-an de januaro 1990. Tuj skribu al ni!

„BE“

En IEK — Pisanica



SOMERAJ INTERNACIAJ KURSOJ

Jam dum multaj jaroj oni organizas en Pisanica Somerajn Internaciajn Kursojn kaj la bulgara esperantistaro al kutimiĝis al tio. Alkutimiĝis en tia grado, ke neniuj pensas kial BEA, organizante ilin, donas tiom grandan subvencion? La respondo estas simpla — ĉar ni bezonas pli da bone posedantaj la lingvon esperantistoj kaj Esperanto-instruantoj. Sed la kutimo ne permesas al multaj kompreni, ke la proceso komenciĝas ekster la kursejo. Jes, ĝi komenciĝas jam en la kursoj por komencantoj, organizataj de la societoj, kie la postuloj al la kursanoj estas ofte tiom malaltigitaj, ke kiam tiuj kursanoj venas al Pisanica, evidentiĝas, ke kelkaj el ili devas reveni en la antaŭan gradon. Ni esperas, ke nun, post kiam ĉiu societo ricevos la Regularon pri la kursoj, tiu problemo malaperos. Sed niaj instruistoj devas memori, ke jam de la komenca kurso oni devas paroligi la kursanojn.

Tamen ekzistas ankaŭ alia problemo. La leteroj, kiujn Instrukomisionoj sendas al la prezidantoj de la societoj plejparte restas ie en la tirkestoj, sen esti konigitaj al la societanoj kaj disvastigitaj inter la neesperantista publiko. La rezulto — en Pisanica venas neinformitaj homoj, kiuj anstataŭ lerni trankvile, devas solvi financajn aŭ alispecajn problemojn.

Ĉi-jaraj kursoj pro diversaj kaŭzoj estis malpli multnombraj, sed ilin partoprenis sufiĉe granda nombro de eksterlandaj es-

perantistoj, kio influis la etoson. La partoprenintoj havis eblecon pli aktive uzi Esperanton, praktiki ĝin kun alilandanoj, kion nome oni celas. Pro la sama kaŭzo estis invitetaj du eksterlandaj lektoroj — en julio Jovan Zarkoviĉ el Jugoslavio, kaj en aŭgusto Marta Kovács el Hungario. Ili ambaŭ estas spertaj Esperanto-lektoroj kaj ilia ĉeesto estis aparte utila ne nur pro ilia korekta lingvouzo, ne nur pro ilia instrua sperto, sed ankaŭ pro tio, ke la kursanoj, parolante kun ili, ne povis en ajna momento transiri al sia nacia lingvo. Ni devas menciigi nepre la strebon de la instruistaro en Pisanica paroli kun la kursanoj en Esperanto, kio donas multon al ili, sed kio ankaŭ timigas kelkajn. Ja estas malfacile, eĉ neeble paroli en Esperanto, se vi provas fari tion nur en triagrada kurso. Ne necesas paroli aparte pri la laboro de ĉiu instruisto — konataj al ni ĉiuj estas Fani Miĥajlova, Nikola Uzunov, Georgi Miĥalkov, Kremona Bâceva, Ivanka Spasova, Rumjana Janeva. Gravas, ke ĉiu instruisto dum tiuj streĉaj tagoj faris ĉion, por variigi la laboron de la kursanoj, por malstreĉigi la etoson, por pli interesigi la instruatan materialon. Kaj eĉ tiuj, kiuj ne sukcesis fari la ekzamenon foriris el Pisanica pli riĉaj je konoj, konsciaj pri tio, ke ili daŭre devas profundigi siajn sciojn.

Kvankam ne tre riĉa, la kultura programo ankaŭ variigis la restadon en Pisanica. Aparte necesas substreki la sinprezenton de la grupo el Stara Zagora kaj la adiaŭan

vesperon en aŭgusto. En la centro de tiu vespero estis la vico de humuraj skeĉoj „El la vivo de la arbora lernejo“ prezentitaj de la komencantoj sub la gvido de R. Janeva.

B-SEMINARIO POR CSEH-INSTRUISTOJ

La organizo de tiu kurso havas sian antaŭhistorion. En 1987 kelkaj bulgaraj Esperanto-instruantoj vizitis A-seminaron por Cseh-instruistoj. Ili ĉiuj estis ravitaj de la personeco de Audrey Childs-Mee kaj ties maniero instrui al komencantoj.

Kaj jen la kurso estas organizita, kaj paralele kun ĝi ankaŭ B-seminario por Cseh-instruistoj. Multon oni povas lerni de s-ino Audrey Childs-Mee, eĉ nur observante ŝiajn lecionojn por komencantoj — sekvas

vorto post vorto, frazo post frazo, ĥora kaj individua respondoj, novaj momentoj kaj ripetaj ekzercoj — kvazaŭ en kalejdoskopoj. Uzi kelkajn elementojn de tiuspeca instruado povas eĉ homoj, kiuj ne instruas laŭ tiu metodo. Tiu ŝajne estis la kaŭzo, ke la laboron de nia koleginino el Esperanto-instituto dum kelkaj tagoj observis ĉiuj, kiuj havis eblecon kaj liberan tempon. Kaj ni ĉiuj bedaŭris, kiam ni devis forveturi post la fino de la someraj kursoj.

Mi kredas, ke speciale por la partoprenintoj en B-seminario tiu kurso kaj lingvakaj metodiko-klarigoj de Audrey Childs-Mee estos ege utilaj, kaj ke ili trovos eblecon post certa mempreparo sekvi ankaŭ C-seminaron.

Libertaria MLADENOVA

Kurso de tradukarto

De la 11-a ĝis la 25-a de aŭgusto j. k. en Pisanica okazis la tria laŭvica kurso de tradukarto. Ĝin partoprenis ok samideanoj, el kiuj kvin ricevis honordiplomojn. Tio estas vera sukceso, se ni konsiderus, ke la tradukado prezentas la plej malfacilan montriĝon de rego kaj uzo de la lingvo.

La kurson gvidis Violin Oljanov, membro de la Akademio de Esperanto. Dum 65 instruhoroj la kursanoj aŭskultis interesajn kaj altkvalitajn lekciojn pri la historio de la tradukteorio, trajtoj de la bona traduko, necesaj trajtoj kaj kapabloj de la tradukisto, necesaj postuloj ĉe tradukado de diversĝenraj tradukoj k. a. Kompreneble, de la komenco mem, paralele kun la teorio ĉiutage la kursanoj faris ekzercojn pri tradukado de diverskarakteraj tekstoj, kiuj iom post iom ĉiutage komplikiĝis. Kulmino de la kurso estis tradukado de belarta literaturo, kaj precipe de versaĵoj, kio estas la plej malfacila speco de tradukado kaj pri kio estas necesa vera talento. La lektoro atentigis, ke multaj samideanoj ne komprenas la esencon de la tradukarto, kaj opinias, ke fininte eĉ nur duan gradon povas traduki. Tion faras ofte gvidantoj de amatorartaj grupoj, kaj per siaj „bravaj“ tradukoj sin prezentas en festivaloj, kaj poste ili miras, kial ne klasiĝis.

La lektoro evidentigis, ke multaj kvalitoj estas necesaj al la tradukanto, sed antaŭ ĉio li devas koni perfekte la du lingvojn: el kiu kaj en kiun li tradukas. Pro tio li atentigis pri iuj specialaj kazoj de lingvo-uzo, multaj el kiuj ne estas instruataj en la lingvaj trigradaj kursoj, oni faris ekzercojn pri tradukado de apartaj bulgaraj esprimoj, de la formoj de la komplika konjugacio de la bulgara verbo ktp.

La rezultoj de la kurso estis kuraĝigaj. Du kursanoj ricevis perfektajn diplomojn kaj tri — bonajn. Elstara estis la sukceso de Bojana Josifova el Burgas, kiu ĉiutage rimarkinde progresis kaj fine eliris sur la unuan lokon. Perfektan diplomon ricevis ankaŭ Nikola Uzunov el Ĥaskovo. Eĉ tiuj, kiuj ne diplomiĝis ne perdis sian tempon. Ili grave perfektigis en la lingvo.

Tiu ĉi formo por plialtigo de la lingvonivelo montriĝis tre efika, pro tio la Instrukomisiono decidis organizi korespondan kurson de tradukarto. Ĉiu fininto de III grado kun tre bona diplomo rajtas aliĝi. Gvidanto ankaŭ de tiuj kursoj estos same Violin Oljanov.

A. BAČVAROV

ĜUO KAJ SERIOZECO

Ekzistas diversaj metodoj de instruado de fremda lingvo. Surbaze de rekta metodo en 1920 Andreas Cseh (Andreo Ĉe), hungardevena pastro el Transilvanio, komencis instrui Esperanton. La kvanto de la gekursanoj ĉe la fino kutime estis pli granda ol en la komenco. En 1930 en Arnhem estis fondita Cseh-instituto, kies plej elstara instruistino nuntempe Audrey Childs-Mee gvidis kurson por komencantoj kaj „B”-seminaron por instruistoj ĉi-somere en Pisanica.

— Sinjorino Mee (Mi), bonvolu prezenti vin antaŭ la legantaro de „Bulgara Esperantisto”.

— Mi estas anglino, loĝanta jam de 16 jaroj en Nederlando, kien mi iris siatempe por labori en CO (Centra Oficejo) de UEA.

Mi instruis en Aŭstralio, FRG, Britio, Pollando, Nederlando, Usono, Hispanio, Svedio kaj nun en Bulgario.

— Kiam kaj kiel vi komencis instrui laŭ Cseh (Ĉe)-metodo?

— En 1974 mi gvidis kurson por IEI (Internacia Esperanto-Instituto) en Hago kaj uzante la materialon mi tuj konstatis kiom malmoderna ĝi estas, iom konfuze prezentita, malfacile sekvebla. Pro tio kiam mi ricevis inviton instrui en Gresillon, Francio en 1977 mi mem verkis rektmetodan kurson laŭ inspiro de Cseh, organizita laŭ la metodo Berlitz, kiu estas eble la plej konata rekta metodo nuntempe kaj en ĉiuj gravaj punktoj havas baze samajn principojn.

— Kiel vi aprezus la laboron dum la kurso por komencantoj kaj „B”-seminaron nun en Pisanica?

— La laboro estis tre ĝua. Mi estas kontenta pri la instrukondiĉoj (sufiĉe granda ĉambro por la kvanto de la gelernantoj kaj observantoj). Mi preferus pli grandan grupon.

La grupo estis afabla, inteligenta, kunlaborema. Sukcesa kaj plezuriga estis por mi la kurso.

La seminarion mi faris iomete alie ol kutime pro tempomanko, pro manko de libroj. Tio malfaciligas la

laboron de la seminarianoj, sed ili tre bone faris ĉion laŭ la cirkonstancoj.

Multaj homoj sukcesas partopreni en „A”-seminario, precipe ĉe kongresoj, sed poste ĉiam estas malfacile partopreni en „B”-seminarioj — pleje por tiuj, kiuj loĝas ekster Eŭropo. Tial ni decidis ebligi al ili fari la studon de la „B”-seminario per korespondo kaj mi ellabo-



ris la necesan materialon. Pro tempomanko en Pisanica mi decidis tiamaniere okazigi la seminarion, ke la seminarianoj ricevu ne la tuton samtempe, sed unu post la alia ricevu la lecionojn de la koresponda kurso. Tiun ĉi materialon ili studis private kaj ni, dum niaj ĉiutagaj renkontiĝoj, diskutis la eventualajn problemojn ktp. La efiko estis por la seminarianoj tre streĉa, sed mi trovas la metodon bona, ĉar ĝi devigas la seminarianojn mem eltrovi solvon al gramatikaj problemoj, kio estas

grava por Cseh-instruisto kaj mi gratulas ilin pri ilia elturniĝemo.

— Ĉu vi havas impresojn rilate la instrulaboron en Pisanica?

— Mi observis provlecionojn kaj partoprenis en unu el postaj diskutoj. Mi havis eblecon diskuti kun diversaj instruistoj kaj ricevis bonajn impresojn pri iliaj postuloj. Mi ŝatus kunlabori kun grupo, kiu havas altajn postulojn.

— Per kio estas karakterizata la laboro de la Internacia Esperanto-Instituto?

— Andreo Cseh kaj gesinoroj Insbrüker fondis en 1930 IEI. Ĝia celo estas disvastigi la uzon de lia metodo. En la komenco ĝi estis nomita Cseh-instituto kaj poste ĝi ricevis la nomon IEI, kaj nun daŭrigas la saman vojon. Post la morto de gesinoroj Insbrüker (60-aj jaroj) kaj la malsaniĝo de Cseh (li forpasis en 1979) la instituto ne tre aktivis dum sufiĉe longa tempo. En sepdekaj jaroj ĝi reaktiviĝis; oni starigis seminarion dum UK-oj. En novembro 1984 komenciĝis nia kunlaboro en la modernigo de la baza Cseh-libro. Sekve ĝi estis petata por gvidado de seminarioj. La unua seminario okazis en aprilo 1985 en Bidgoszcz (Pollando) post la Internacia Metodika Seminario, kiun mi partoprenis en Varsovio.

La ideo de 3-ŝtupa seminario venis de Claud Gacon al Chaux de Fonds (Svislando). Eble la sperto indikos al ni ŝanĝi la sinsekvon de tiuj kursoj aŭ havi ian postulon antaŭ ol allasi la homojn.

Mi evoluigis la ideon tiel ke „A”-seminario estu enkonduka (la interesatoj konatiĝas kun la metodo),

„B” estu pliprofundiga (dum kiu oni studas pli profunde la lingvon laŭ pedagogia kaj metodika vidpunktoj) kaj „C”-seminario estas tiu, dum kiu la seminarianoj prezentas modellecionon por prui sian kapablon. Se la komisiono estas kontenta, la kandidatoj ricevas diplomon.

En la praktiko estas malsaĝe allasi homojn sen pruvita lingvokapablo al „A”-seminario, ĉar ili povus kapti bone la metodikon kaj uzi ĝin per malsufiĉe bona lingvo.

— Vi estas ĝenerala sekretario en la nova estraro de ILEI. Kiel kaj kiudirekte disvolviĝas la celoj kaj la laboro de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj nuntempe?

— Pasintjare en Kerkrade estis elektita nova estraro de ILEI. Prezi-

danto estas Edward Symoens, vicprezidanto — Stefan MacGill. Ni havas novan agadplanon. Ĝi akordiĝas kun la nova strategia plano de UEA.

ILEI aldonis la pedagogian materialon de Irena Šancer, kiu estas deviga studmaterialo por partoprenantoj en pedagogiaj internaciaj kursoj, okazigataj de ILEI.

Ni planas la eldonon de internacie uzeblaj instrumaterialoj, pri kiuj okupiĝas ĉefe Stefan MacGill. Jam estas eldonita broŝuro kun informoj pri internaciaj ekzamenoj de ILEI-UEA je elementa kaj meza niveloj. Estas ellaborata materialo por supera ekzameno.

ILEI kunlaboras kun diversaj organizoj. E. Symoens estas membro de la Fonduso „Zamenhof”. Organo de ILEI estas „Internacia Pedagogia Revuo” (IPR). Ĝin devus aboni ĉiu instruisto (almenaŭ instruista grupo

devas disponigi ĝin al la homoj). La revuo estas iaspeca interligilo.

Dum la ĵus okazinta konferenco de ILEI en Caerleon, Kimrujo la estraro aprobis projekton, iniciatitan de s-ro Lawrence Mee (Britio) pri interreta vortaro de ordinara Esperanto kaj donis al ĝi sian oficialan apogon. La kunlaborantoj estas el diversaj lingvofamilioj.

— Kion vi bondezirus al la legantaro de „Bulgara Esperantisto”?

— Al la legantaro de „BE” mi bondeziras ĉion bonan; ĝuon, sed samtempe seriozecon je la studo de Esperanto, kio estas la plej valora en la mondo — ili ne traktu ĝin facilnime. Kaj ni ne forgesu, ke ĉiu esperantisto en la komenco bezonas admonon.

Intervjuis: Cvetanka UZUNOVA

PRI LA VETERANOJ ESPERANTISTOJ

Antaŭ nelonge en Varna okazis la kvina tutlanda renkontiĝo de la bulgaraj veteranaj esperantistoj, organizita de Veterana sekcio de BEA kun la helpo de la Veterana E-klubo en Varna. Oni informiĝis pri la agado de la respublika veterana sekcio dum la lastaj du jaroj. Post diskutoj kaj aprobo de rezolucio pri la estonta agadperiodo, oni elektis novan estraron. Pro la fakto, ke la ĝisnuna prezidanto, nia estimata veterano Stojan Kostadinov fariĝis 85-jaraĝa, oni estimis liajn motivojn demisii kaj elektis min kiel pli „juna” ol li (nur 80-jaraĝa) prezidanto...

Ĉi-sube mi ŝatus interŝanĝi kun la legantaro de „Bulgara Esperantisto” kelkajn pensojn pri la rolo de la esperantistaj veteranoj.

Laŭ la Statuto de Veterana Esperantista Klubo (VEK), kiu funkcias en internacia skalo kaj kies sekcio estas la respublika esperantista veterana sekcio de BEA, veterano estas tiu esperantisto, kiu almenaŭ dum minimume 40 jaroj restis fidela al Esperanto. Feliĉe, en Bulgario la nombro de la veteranoj-esperantistoj estas sufiĉe impo-

na. Ili prezentas utilan kapitalon de BEA kaj estas ligitaj kun diversaj aliaj neesperantistaj organizaĵoj kaj movadoj en nia lando. Tiamaniere ili levas la aŭtoritaton de la bulgara esperantista movado en la okuloj de la neesperantistaj movadoj kaj organizaĵoj, kun kiuj BEA intime kunlaboras por la efektivigo de gravaj naciaj kaj internaciaj taskoj precipe en la sfero de protekto de la paco, interkompreniĝo kaj amikeco inter la popoloj, forigo de la minaco de nuklea neniiĝo de la vivo kaj de la homara kulturo kaj civilizo.

Ĉiuj movadoj, des pli la ideoj movadoj, fieras pri siaj adeptoj, kiuj dum pluraj jaroj agadis en iliaj vicoj, alportis sian obolon por la sukceso de ties ideoj kaj faroj. La esperantista movado ne faras escepton. Eĉ pro sia pionira karaktero, pro la multaj primokoj kaj superstiĉoj rilate la eblecon pri ekzisto de artefarita lingvo, la veteranoj de tiu ne tre populara movado estas alte estimataj kaj sekvataj de la pli junaj esperantistaj generacioj. Kaj tio estas tre natura fenomeno: la junuloj bezonas ne nur buŝajn

konsilojn aŭ rekomendojn, sed ankaŭ vivan praktikan ekzemplon de senhezita esperantisteco. Precipe, estas ege aŭtoritataj tiuj veteranoj, kiuj distingiĝis kiel bonaj organizantoj, spertaj propagandistoj, perfektaj konantoj de la Internacia Lingvo, kontakte-maj kaj helpemaj, modestaj kaj sindonaj, bravaj kaj senhezitaj antaŭ diversspecaj malamikoj de Esperanto.

Sendiskute, la sukcesa publika agado de kiu ajn organizaĵo aŭ movado dependas altgrade de la kunligo de la entuziasmo kaj energio de la junuloj kun la sperto kaj saĝeco de la veteranoj. Mi mem ĝis mia lasta spiro ne forgesos la helpon, kiun mi ricevis de pli aĝaj ol mi esperantistoj, kiam mi faris miajn unuajn paŝojn en la esperantista movado antaŭ pli ol sesdek jaroj.

Tute nature, inter la konceptoj kaj kutimoj de la pli junaj generacioj kaj la veteranoj estas granda diferenco. Sed tio ne malebligas la komunan agadon en la intereso de la movado. La veteranoj estu la iniciatintoj de paŝoj por proksimiĝo al la junuloj.

Por atingi tion, la veteranoj devas strikte apliki kelkajn simplajn kondiĉojn: esti modestaj kaj toleremaj, ne trudu al la junuloj siajn konsilojn kaj rekomendojn, se oni implicite ne petas ilin pri tio. Tiamaniere la interrilatoj de la generacioj estiĝas naturaj, la konversacioj — egalrajtaj, la interŝanĝo de opinioj — demokrateca.

Mi ŝatus fini ĉi liniojn per la vortoj de mia amiko Petro Polŝĉuk, soveta veterano el Taŝkento (jam forpasinta), adresitaj al la veteranoj-esperantistoj:

*„ Ni estas maljunaj, ni tamen ne plendu!
Humile ni finon de l'viv' ne atendu —
ni arde agadu, ni vivu labore
al niaj ideoj kaj lando honore!
Ni estu al junaj gefratoj similaj,
al celoj de nia Movado utilaj
ĝis lasta momento, ĝis fina vivhoru,
ke restu pri nia agado memoro
pri nia sindono, pri nia fervoro!“*

Nikola ALEKSIEV,
prezidanto de Veterana Sekcio ĉe BEA

Neforgeseblaj renkontiĝoj

Tradicio estas la gastadoj inter esperantistoj el „Klubo de la veteranoj“ ĉe E-societo „Albatroso“ — Varna. La kaŭzoj por tio estas diversaj, sed plej ofte — naskiĝtagoj.

La 10-an de junio 1989 Stefan Apostolov festis sian 75-an datrevenon. Liaj dezirataj gastoj estis la esperantistoj-veteranoj: docento Georgi Dimov, Ĥristo Cvetkov, Nikolaj Kulev kaj Avram Levi.

La gastoj kaj St. Apostolov rakontis interesajn okazintaĵojn ligitajn kun Esperanto. Doc. Georgi Dimov rakontis pri la ĝojo, kiam li estis ricevinta unuan Esperantan, fremdlandan leteron. Ĥristo Cvetkov rakontis epizodon ligitan kun Esperanto en la kazerno, okazinta antaŭ 58 jaroj.

En la parolado la veteranoj ĝustigis datojn, lokojn, geesperantistojn — partoprenantajn en malnovaj renkontiĝoj, konferencoj kaj kongresoj.



De maldekstre Ĥr. Cvetkov, la jubileulo St. Apostolov — en la mezo, doc. G. Dimov kaj malantaŭe Avram Levi, N. Kulev.

La gastoj trarigardis la bone ordigitajn korespondiĵojn el tuta mondo de la jubileulo.

inĝ. Nikolaj KULEV,
Varna

POETO DE PROLETA OPTIMISMO

80 JAROJ DE LA NASKIĜO DE NIKOLA J. VAPCAROV (1909—1942)

Vapcarov komencis publikigi versaĵojn en 1926. Lia unua versaĵo estas titolita „Al brila idealo” kaj aperis en la organo de la abstinentuloj „Borba” (Batalo). En tiu ĉi verko li esprimis sian kredon je homa progreso. Sekvis dua versaĵo „Ke lumu la torĉo”.

En la sama jaro laŭ la volo de sia rigora patro, Nikola eniris Maristan Maŝinteknikan Lernejon en Varna. Dum la militservo en tiu ĉi urbo li prunteprenis librojn de la urba biblioteko kaj daŭrigis sian literaturan memklerigadon. Li legis verkojn de Puŝkin, Lermontov, Byron, Sheley, Goethe, sed plej multe lin kaptas la poezio de la bulgara poeto Pejo Javorov. La verkoj de tiu ĉi granda poeto kaj la popolaj kantoj — jen estas la fontoj, el kiuj ĉerpis la juna poeto. Li ellernis parkere dekojn da versaĵoj de bulgaraj kaj fremdlandaj poetoj.

En 1932 li finis la studadon en la maŝinteknika lernejo kaj revenis sian naskiĝurbon Bansko. Lia patro estis amiko de la eldonisto de la granda tag-ĵurnalo „Zora” kaj tiu konsentis dungi ĉe si la junan poeton, kondiĉe ke li kunlaboros en la spirito de la burĝa gazeto, kia estis „Zora”. Vapcarov rifuzis kaj dungiĝis kiel hejtisto en paperfabriko en urbo Koĉerinovo. Li kontaktiĝis kun samideanoj kaj legis antaŭ ili referatojn pri literaturaj temoj kaj pri siaj vojaĝoj en la landoj de la Proksima Oriento.

En la paperfabriko laboris rusoj, elmigrintaj el Ruslando post la Oktobra Revolucio. Iuj el ili estis konviktaj malamikoj de la sovetia regpotenco. Vapcarov diskutis kun ili, rakontis pri la grandaj transformiĝoj socialaj en tiu lando, pri la nuntempaj sovetiaj verkistoj Ŝolohov, Tolstoj, Gladkov k. a.

En 1936 Vapcarov translokiĝas al Sofio, por esti pli proksime al la progresema verkistoj, kies organo estis nomata „Kormilo” (Direktilo). En la ĉefurbo li vane serĉas laboron por vivteni sian familion. En Sofio lia unua verko estas la poemo „Patrolando”. La redakcio de „Kormilo” aprobis la versaĵon kaj rekomendis al li elekti por si pseŭdonimon. Li cerbumis longe kaj fine elektis la nomon de sia patro Jonko. Tiel en la progresema literaturo aperis nova aŭtoro: Nikola Jonkov.

En ligo kun la morto de Maksim Gorkij la redakcio komisiis al li verki versaĵon pri la mortinta verkisto. Titolita „Al Gorkij” la versaĵo aperis julie 1936.

Tamen la restado en Sofio estis senespera! Ĉiutage li iris de uzino al uzino por serĉi laboron. Pro mizero mortis lia sepmonata fileto. En tia animstato li verkis la versaĵon „Aŭroro” — la unua poeziaĵo, per kiu la aŭtoro novigas vortojn, formon, stilon.

La versaĵo „Epoko”, publikigita en novembro samjare, estas ne nur poezia karakterizo de la historia momento, sed ankaŭ de la malnova kaj kruela mondo, kiu kaŭzos al la homaro suferojn, malfeliĉon kaj morton.

En somero de 1937 la poeto komencis verki ciklon pri Hispanio. Li pense troviĝis sur hispana tero. Naskiĝis „Sonĝo”, „Kanto pri la kamarado” kaj „Kanto de l' edzino”. Ĉiuj poemoj pri Hispanio prezentas apartajn, integrajn lirik-dramecajn etudojn. La herooj estas samaj — Fernandes, batalkamarado Lori, Dolores, la edzino de Fernandes kaj ŝiaj gepatroj. En „Letero” la aŭtoro preterlasas la realisman pensmanieron kaj pentras bildon romantikan.

En 1937 li partoprenas konkurson pri poezio dediĉitan al la aviado. Pri tiu temo lin inspiris la heroaĵo de la sovetiaj aviadistoj Ĉkalov, Bajdukov kaj Beljakov,



kiuj seninterrompe flugis de Moskvo ĝis kanada urbo Vancouver. Vapcarov titolis tiun ĉi poeziaĵon „Romantiko”.

Lia cigna kanto estas la dustrofa „La lukto estas senkompat-kruela”. La unua strofo estas verkita en la infero de la polica direkcio:

*La lukto estas senkompat-kruela —
laŭ onidiroj estas ĝi eposa.
Mi falis! Anstataŭos min fidela —
ne estas mia personec' kolosa.*

La dua strofo — kelkajn horojn antaŭ la mortopafo, la 23-an de julio 1942:

*Mortpafo kaj post la mortpafo — vermoj...
Ĉi estas tiom simpla kaj logika.
Tra ŝtormo pasos vi — popolo — per ni,
Ĉar nia am' al vi estas am' unika.*

(Traduko; Canko Murgin)

La poezio de Vapcarov estas rekonita nur post lia perejo. Nemultaj liaj samtempuloj komprenis lian poezion. Por li la gloro venis postmorte. Nuntempe lia nomo staras en la unuaj vicoj kun la mondkonataj poetoj de la kontraŭfaŝisma batalo Garcia Lorka, Nazim Hikmet, L. Aragon, P. Eluard, B. Brecht, P. Neruda.

Laŭ atesto de lia frato Boris, Nikola Vapcarov ellernis Esperanton, sed neniam verkis en ĝi. Tamen esperantistoj-tradukistoj, ŝatantoj de lia poezio tradukis esperante preskaŭ la tutan verkaron de la poeto, tiamaniere konigante ĝin al la mondo esperantista.

Hristo GOROV

NIKOLA VAPCAROV

HISTORIO

*Vi kion montros, historio,
el viaj paĝoj arkaikaj?
Ni estis homoj nekonataj
el oficejoj kaj fabrikoj.*

*Ni estis kamparanoj, bulbon
kaj acidaĵojn odorantaj;
el sub lipharoj ni insultis
la vivon kun kolero granda.*

*Ĉu vi almenaŭ nin redankos,
ke ni vin nutris per eventoj;
ke vin trinkigis per la sango
de l' ekstermitaj homtaĉmentoj?*

*Vi skizos sole la konturojn —
interne estos ja malplene,
kaj plu neniu rakontados
pri l' simpla homa dramo ene.*

*Poetoj estos absorbitaj
per urĝaj taskoj, agitrodoj,
kaj la angoro ne skribita
vagados sola en la mondo.*

*Ho, nia viv'! Ĉu oni povus
priskribi, pentri ĝin? — Apenaŭ!
Se oni tuŝus ĝin — odorus,
amarus ĝi kiel veneno.*

*Sur la grenkampoj ni naskiĝis,
ŝirmate ĉe l' arbustoj pikaj;
patrinoj niaj kuŝis ŝvitaj
kaj mordis siajn sekajn lipojn.*

*Aŭtune mortis ni amase,
virinoj vee lamentadis
kaj plor' ilia sonis kante,
sed nur la loloj ilin aŭdis.*

*Ni, la restintaj vivaj, penis,
laboris ni per fortoj tutaj.
Ni faris iun ajn laboron,
ni laboregis kiel brutoj.*



Grafikaĵo: Penka PETKOVA

*La patroj hejme saĝumadis:
„Tiele estis, estas, estos...”
Kaj ni malŝate kraĉis, ĉar ja
sentenc' ilia stulta estas.*

*Forlasis ni la manĝotablon
kaj elhejmiĝis kun kolero —
ekstere tuŝis nin sorĉplene
per sia lumo la espero.*

*Ho, kiel streĉe ni atendis
en la kafejoj homoplenaj,
kaj malfrunokte enlitiĝis
kun la lastdataj frontbultenoj.*

*Ho, kiel ege ni esperis!...
Sed premis la ĉielkupolo
kaj siblis la aer' varmega...
Mi ne plu povas, ne plu volas!*

*Sed en volumoj multenombraj
el sub linioj kaj literoj
kriegos kaj la dentojn montros
turmentoj niaj kaj suferoj —*

*ĉar nin bategis senindulge
la vivo per la pezaj manoj
sur la malsata buŝo rekte, —
pro tio nia lingvo lamas.*

*Kaj por verkadi niajn versojn
el nia dorm' ni ŝtele prenas.
Mallongaj tial ili estas
kaj senparfumaj, malserenaj.*

*Por la sufer' ni ne pretendas
premiojn, nek per kliŝoj niaj
ni tedos ja dum la jarcentoj
amasigintajn librojn viajn.*

*Sed vi rakontu simplavorte
al ili — la estontaj homoj,
starontaj sur posteno nia,
ke brave luktis ni sennomaj.*

Tradukis: Asen GRIGOROV

MI ESTOS OLDA

*Mi estos olda, kun centjara vivo-vibro,
se restos mi post la pogromoj,
kompreneble —
simile al ĉifona alfabeto-libro,
uzita certe dum plur-pluraj jarodekoj.*

*Simile al infanoj, kiuj foliumas —
tuj komencante kun la bildoj ekde fino,*

*samtiel ankaŭ mi deziras tuj cerbumi
kaj revi pri la estonteco senruina.*

*Ho, kial ne? — En revoj mankas la cenzuro,
varmigas revoj per lazura diafano —
pli bone estas kuri laŭ la venta spuro
ol stagni kaj ekside plori, vei vane.*

Tradukis: Canko MURGIN

ADIAŬA

Al mia edzino

*Dum via dorm' mi venos iufoje
samkiel gast' neatendita, fora.
Ne lasu min ekstere sur la vojo —
ne riglu vi la pordon!*


*Senbrue enirinte, milde mi eksidos,
okulojn fiksis sur vi kun admiro.
Kaj longe rigardinte vin avide,
mi kisos vin kaj poste mi foriros.*

Tradukis: Simeon M. SIMEONOV

75-a Universala Kongreso de Esperanto

Havano (Kubo), 14—21 julio 1990,
Konstanta adreso: Nieuwe Binnen-
weg 176, 3015 BJ Rotterdam, Neder-
lando

Adreso de LKK: Kuba Esperanto-Aso-
cio, Apartado postal 2018, 10200 La
Habana 2, Kubo



Kongresa palaco „Kubo“

Jubileo (denove): La 75-a Universala Kongreso de Esperanto denove prezentas okazon jubilei, t. e. kongresi la 75-an fojon post la 1-a UK okazinta antaŭ 85 jaroj en 1905.

Alta Protektanto: Tiun honoran postenon volonte transprenis prof. d-ro Carlos Rafael Rodríguez, vicprezidento de la Respubliko kaj vicprezidanto de la registaro de Kubo. Li estas plej elstara nuntempa kuba intelektulo, doktoro pri juro, kiu habilitiĝis pri sociaj sciencoj, politikologio kaj ekonomiko, okupis plurajn ministrajn postenojn, estis ĵurnalisto, verkis multajn librojn, estas la ĉefa kuba diplomato, vaste konata ankaŭ internacie.

Kongresejo: La 75-an UK gastigos la impona Kongresa Palaco, moderna arkitektura verko, plene klimatizata, riĉe ekipita, kun aro da taŭgaj salonoj en ĉiuj grandecoj, kun poŝto, banko, vendejoj, bufedoj, restoracioj, ĝardenoj, kaj vastaj kaj komfortaj vestibloj. Ĉiuj kongresaj aranĝoj okazos en tiu admirinda atingiĝo de la nuntempa konstruaro.

Klimato: Ne necesas timi la kuban klimaton. Kvankam

la lando estas je la samaj latitudoj kiel Saharo, ĝi ja estas insulo, kaj Havano estas haveno mara, kun iom da vento kaj eĉ pluvo dum la kongresa periodo. Ni siatempe konsilos al vi kiajn vestaĵojn porti, sed jam nun sciu, ke ili estu kiel eble plej malmultaj kaj praktikaj.

Loĝado: Havano havas multajn komfortajn hotelojn, plej ofte klimatizatajn. Ni jam rezervis sufiĉan kapaciton en diversaj prezkategorioj. Por via orientiĝo jen proksimumaj prezoj, kiuj inkluzivas: tranokton, matenmanĝon, transporton de kaj al la flughaveno kaj ĉiutage de la hotelo al la kongresejo (matene) kaj reen (vespere). La prezoj estas por unu persono kaj por unu tranokto. Luksaj hoteloj: unulita ĉambro 90 guldenoj, loko en dulita ĉambro 70 gld. Turismaj hoteloj: unulita ĉambro 65 gld., loko en dulita ĉambro 50 gld. Studenta domo: loko en dulita ĉambro 33 gld. Loka Kongresa Komitato faras klopodojn organizi ankaŭ amasloĝejon, sed detaloj pri tio ne estas nun haveblaj.

Ekskursoj: Multaj ekskursoj estas en preparo:

dumkongresaj (duontagaj, tuttagaj, vesperaj), post- kaj antaŭkongresaj. Ĉar ankaŭ la TEJO-Kongreso okazos en Kubo (7—13 julio), tre verŝajne eblos aliĝi al ĝi kiel al la Antaŭkongreso kaj pasigi trankvilan semajnon ĉe rava strando de lazura tropika marbordo. Detaloj aperos en la Dua Bulteno.

Flugvojaĝoj: UEA organizos plurajn flugkaravanojn per diversaj flugkompanioj. Kelkaj el ili inkluzivos ankaŭ vizitojn al najbaraj landoj kaj regionoj. Ni provas definitivi tiujn aranĝojn por anonci ilin frue.

Aliĝilo kaj Unua Bulteno: Ambaŭ jam aperis kaj distribuiĝis al ĉiuj individuaj membroj de UEA (kun la Jarlibro kaj Gvidlibro). Intertempe ankaŭ la kongresaj perantoj ricevis ekstrajn kvantojn.

Kongresa temo: La temo de la 75-a UK estos „Esperanto, evoluo, kultura diverseco“. Oni antaŭvidas dediĉi apartan atenton al la rolo de Esperanto en la evoluantaj landoj kaj al ĉi ties rolo en la internacia movado.

El „Esperanto“ n-ro 7—8/89

Bulgaraj memoraĵoj

La artmetioj en Bulgario havas multjarajn tradiciojn. De pratempe bulgaraj majstroj skulptis kaj brulĉizis lignon, forĝis mirindajn formojn el fero kaj kupro. Lertaj virinoj teksis fantaziajn planktapiŝojn, brodis originalajn brodaĵojn. Per freŝaj koloroj ili reproduktis la belecon de la naturo. Nuntempaj majstroj sekvas la tradiciojn kaj daŭre ellaboras verkojn kun perfekta kaj moderna gusto. Diversaj entreprenoj, heredantoj de branĉoj de la bulgara aplika arto, konservas kaj disvolvas la plej bonajn popolmetiojn, kontentigas la kreskantan serĉadon de memoraĵoj, art-kaj metiproduktaĵoj, en enlanda kaj internacia bazon.

Turistoj el la tuta mondo ĉiujare invadas nian landon. Krom la vojaĝ-kaj restadimpresojn ili ŝatus kunporti memoraĵojn por si mem aŭ por siaj gefamilianoj, amikoj! La eblecoj estas riĉaj. Plenaj magazenoj je suveniroj malfaciligas la aĉetantojn. Kion elekti?! Decidu mem! Sed, certe la plej aĉetata objekto estas la pupo. Ĉu eta aŭ pli granda, kun buntkolora vestaĵo, ĝi eniras la turistan valizon kaj ekvojaĝas al diversaj teranguloj por porti ĝojon kaj varmecon el



nia suna Bulgario! Pupoj, prezentantaj la nacian vestaĵon el diversaj regionoj de la lando. Ne mankas originalaj pupoj — memoraĵoj, la t. n. „kukeri” (maskitoj), ankaŭ ege buntkoloraj.

Ŝatataj aĉetobjektoj estas la tablokovriloj el nacia teksaĵo — kvadrataj aŭ rektangulaj, la brulĉizitaj skatoloj en diversaj grandecoj, lignaj cigaredingoj.

Pli multekostaj estas la arta teksaĵo kaj la tapiŝoj — mane ellaboritaj en popolstilo el la regionoj de urboj Kotel kaj Ĉiprovc. Ne forgesu la ĉarmajn virinajn bluzojn kaj virajn ĉemizojn, famajn pro sia mirinda, tipe bulgara brodaĵo!

Aparte allogas per sia varieco la ornamaĵoj — ili povus esti faritaj el led, fero. Ornamitaj per gemoj — broĉoj, ringoj, kolĉenoj, kolieroj — ĉiam mane ellaboritaj, bruldesegnitaj, brulgravuritaj.

La ceramiko, la tapiŝoj, la teksaĵoj, objektoj el forĝita metalo — ĉiuj ĉi produktoj,





per sia individueco kaj originaleco elradias specialan varmecon kaj aldonas agrablan komforton en la hejmo.

Kaj fine, jen bukedo el miloj da rozoj — la bulgara rozoleo, kies kultivado kaj produktado povus esti aparta temo. Nun oni devas nur diri, ke unu kilogramo da rozoleo estas ricevata el tri tunoj da rozfloroj. Imagu, kian bukedon vi prezentos al via amikino, donacante al ŝi nur unu gramon da rozoleo! Plej aĉetata estas la rozesencon — pli facila alkohola solvaĵo de la oleo.

Veran plezuron kaj riĉajn impresojn igas la ekspozicioj, organizataj je diversaj niveloj. Ilin partoprenas aplikaj pentristoj, famaj popolaj majstroj metiistoj kaj metiistaj kooperativoj. Miloj da objektoj trovas lokon en ili. En multnombraj ĉambroj oni ordigas kaj elmontras eksponaĵojn.

Jen lignaj objektoj, faritaj de majstroj el urbo Teteven — ege kapablaj lignoĉizistoj. Ili memorigas sukcenkolorajn vinberojn, kampoflorojn, foliojn el nevelkiĝanta hederro. Kaj ĉiu ĉi beleco estas lerte ĉizita en la molaj lignaj faldoj!...

Longharaj lankovriiloj, t. n. „haliŝta“, „kozjaci“ allogas per siaj buntaj koloroj, saĝe elektitaj kaj ordigitaj en mirindajn kombinaĵojn. Certe ili ĉeestas en ĉiu bulgara domo!



Hejme faritaj (teksitaj) planktapiŝoj, t. n. „ĉergi“ tuj kaptas la okulojn kaj ravas per sia kvalito kaj ordigo de la koloroj. Ŝajnas, ke la sunaj radioj falis sur ilin!...

Farbojn, farbojn!... Ili ĉiuj estas ricevitaj el pure naturaj plantoj — folioj de persikarboj, ŝtona likeno, ŝelo de alno, ranunkolo, verdaj ŝeloj de nuksoj k. t. p. Jes, riĉa naturo — riĉaj koloroj!...

Por la ŝatantoj de popolaj muzikinstrumentoj estas elmontritaj elegantaj guzloj, ellaboritaj de majstroj el urbo Karlovo. Ne estas forgesitaj la homoj, kiuj ŝatas sidi kaj ripozi apud kameno — por ili estas prezentitaj interesaj kaj variaj objektoj el forĝita fero. Brilas kupraj teleroj, glasoj, trinkvazoj, bokaloj, servicoj. Oni diras, ke la plej bongusta kafo estas tiu, farita en ruĝa kafobolujo. Majstroj de kupraĵoj estas la majstroj el Rodopi-montaro.

Pendigitaj sur la muro oni povas vidi telerojn el ligno aŭ ceramiko — riĉe ornamitaj ĉu per diversaj elementoj de floroj, branĉoj, ĉu en tute nova moderna stilo.

Vi forlasas la ekspozicion. Ĝi memorigos al vi la freŝan aeron ĉe nia Nigra Maro, en niaj montoj, la aromon de niaj fruktoj, floroj, la muzikon de niaj kantoj kaj dancoj, la varman koron de niaj homoj!

Lilia KOLEVA

Ni pli multe agadu ol parolu...

Antaŭ 12 jaroj la komunumo en urbo Bankja aprobis la proponon de la loka E-societo „Solidareco“, ke la urbo havu straton „Esperanto“.

Ĝi estas kvietata strato kun multe da arboj, precipe betuloj kaj belaj privataj domoj, ĉirkaŭitaj de verdaĵo kaj buntaj floroj. Tiun straton konas ĉiuj bankjanoj pro tio, ĉar tie troviĝas la komenca haltejo de la aŭtobusoj, kiuj cirkulas inter la urbo kaj Sofio, kaj pro la festo de la strato. Tiun feston ĉiujare organizas la lokaj esperantistoj kaj la kvartala organizaĵo de la Patrolanda Fronto. Pri tiu festo mi multon aŭdis de partoprenintoj. Ankaŭ pri ĝi estas aperigataj informoj en gazeto „Bankja“ kaj en tutlandaj ĵurnaloj.

Varma julia vespero. Mi kun dudeko da gesamideanoj el Sofio eltrajniĝis. Irante tra Bankja, la prezidanto de la societo „Solidareco“ Boris Atanasov informas min, ke la urbo havas iom pli ol 10 000 loĝantojn. La E-societo ne estas multnombra, sed ĉiujare organizas dudekon da aranĝoj, el kiuj kelkaj estas je landa kaj internacia nivelo. Pro sia bona kaj milda klimato kaj la mineralakvaj banejoj la urbo estas konata en la tuta lando kaj eksterlando. Por ke la alilandaj feriantoj povu facile orientiĝi en la urbo, la nomoj de la stratoj estas skribitaj per cirilaj kaj latinaj literoj.

Ni alproksimiĝas al strato „Esperanto“. Laŭtparoliloj disaŭdigas muzikon de orkestro. Sur la palisaroj de la

domoj oni vidas grandajn slogan-rubandojn pri Esperanto. Antaŭ pentraĵoj kaj desegnaĵoj de infanoj, kiuj loĝas tie ĉi, staras, rigardas kaj komentas grupo da alvenintoj. La temo de la ekspozicio estas Esperanto kaj la amikeco. Ĉe dudeko da tabloj alportitaj de la domoj jam sidas dommastroj. Ili bonvenigas la gastojn venintajn el diversaj partoj de la urbo kaj de proksimaj loĝlokoj, konversacias kaj trinketas. La tabloj estas plenplenaj je manĝaĵoj, salatoj, desertoj kaj fruktoj, kiujn alportis la lertaj dommastriroj.

La prezidanto de la kvartala Patrolanda Fronto ekparolas pri la rolo kaj la signifo de la festo. Mi salutparolas je la nomo de la Turisma Sekcio ĉe Bulgara Esperantista Asocio, kaj poste aktivulino Neli Abaĝieva el Sofio. Poste dudeko da bankjanoj kantas, deklamas, muzikas kaj rakontas humuraĵojn. Spontane aperas ĉe la mikrofono nia samideanino, la artistino Anna Ivkova. Ŝia humura dekminuta versaĵaro „La tri avinoj“ de la bulgara klasika verkisto Elin Pelin estis forte aplaŭdita.

Komenciĝis la distra parto. La orkestro ludas estradajn kaj folklorajn kantojn kaj melodiojn, kaj la festantoj dancas verve modernajn kaj rondodancojn. La organizantoj disdonadas kartonajn ĉapelojn kaj flugfoliojn por propagando de Esperanto. En la kulmino de la festo ni

provis nombri la partoprenantojn. Tio ne estis facila tasko, ĉar oni venadas, promenadas, foriras. Versajne la aranĝo allogis ne malpli ol 350 personojn. El ili 182 subskribis gratulleteron al Egor Jakovlev, la ĉefredaktoro de la gazeto „Moskvaj Novaĵoj“ pro aperigo de provnumero de la gazeto en Esperanto.

Ĵurnalistino el ĉiutaga ĵurnalo „Kooperativno Selo“ (Kooperativa Vilaĝo) intervjuis Boris Atanasov kaj min pri la festo kaj la lingvo.

Noktomeze kun bedaŭro, sed en bonhumoro mi kun aliaj sofianoj devis ekiri al la stacidomo, por ke la lasta trajno povu transporti nin al la ĉefurbo.

Sendube, mi kiel multaj aliaj partoprenantoj en la festo venontjare denove revenos la belan kaj koketan urbon Bankja ĝui la novan „eldonon“ de la festo.

Multaj movadaj aktivuloj ofte konversacias, diskutas, disputas aŭ verkas artikolojn je temoj „Kiel altiri novajn fortojn en la movadon“ kaj „Kiamaniere ni eliru el nia libervola izoliteco“. Ŝajnas al mi, ke la organizantoj de la festo de strato „Esperanto“ kaj de la Turismaj Esperanto-Tagoj en Sofio montras unu el la bonaj vojoj por solvo de tiuj dilemoj.

Kaj fine, jen unu grava pripensinda propono: „Ĉu ne venis tempo, ke en nia movado ni pli multe agadu ol paroli kaj proponi?“

Dankletero al sofiaj ĥoranoj

Pro diversaj kaŭzoj mi transloĝiĝis je kvar kilometroj for de urbo Belogradĉik, en lokon Gorni Krupac, kie estas fontoŝtono. De frua printempo ĝis malfrua aŭtuno mi loĝas ĉi tie en la posedata de nia familio modesta vilao „Esperanto“. Ĉirkaŭ ĝi etendiĝas nia kaj multaj aliaj vinberoj, legom- kaj florgardenoj. Ĉi tie mankas terura urba bruoj, aero estas pura kaj ĉio dronas en abunda verdaĵo.

Sed kie restis mia kara Esperanto? Tiun ĉi neceson mi kontentigas per legado de valoraj, ege bonaj E-revuoj „Bulgara Esperantisto“, „Es-

peranto“, „Panorama — Esperanto“, konversacias kun mia edzo Todor kaj fojfoje korespondas kun eksterlandaj kaj bulgaraj esperantistoj. Sur la ekstera muro estas ŝildeto „Esperanto“, kiu montras, ke tie ĉi loĝas esperantistoj.

La 1-an de julio k.j. surprize vizitis nian vilaon Vasil Vutov, Dimitrina Genova kaj Stefka Akmanova. Ili invitis min kaj mian edzon ĉeesti koncerton de la Sofia E-Ĥoro, kiu okazos la sekvan tagon en Belogradĉik. Bedaŭrinde ni ne povis ĉeesti la koncerton, tamen D. Genova insiste invitis nin

al la loka Turista Domo renkontiĝi kun la ĥoranoj antaŭ ties forveturo. Tie ni havis la feliĉon revidiĝi kun la kara Ĥoro, kun miaj bonaj geamikoj: Vutov, Petkov, Dimitrina, Nadja, Stefka, Elena, Angelina.

Kunĉo Vâlev kortuŝe salutis min, Dimitrina enmanigis al mi florojn kaj la Ĥoro plenumis etan salutkoncerton sub la sperta gvidado de sia ĉarma estrino Katja Vučkova.

Mi kaj mia edzo Todor elkore dankas al iniciatintoj de tiu ĉi neforgesebla renkontiĝo.

Zora OŠANSKA

Gaste en vilao „Esperanto“

Varma aŭgusta tago. Dekses diversaĝaj gesamideanoj de E-Societo „Nova Vojo“ — Pernik vojaĝis al Kovaĉevci. La antaŭlastan haltejon antaŭ vilaĝo Kosaĉa ni elbusiĝis. La „kulpulo“ pri tiu promenado estis la 70-jara jubileulo, veterana esperantisto Aleksandro Nakov — kasisto de nia societo. Li renkontis nin en la komenco de la vilaĝa kvartalo. Ni kune suriris malgrandan altaĵon kaj post nelonge atingis novan domon, ĉir-

kaŭitan per legom- kaj fruktĝardeno. Verda ŝildo „Vilao „ESPERANTO““ agrable surprizis nin. La bonhumoro plialtiĝis. Ni okupis la destinitajn por ni lokojn ĉe longaj, blanke kovritaj tabloj en la korto sub la ombro de grandaj arboj. Nia kara jubileulo estis superŝutita per multaj donacoj. La gastamaj familianoj tre rapide plenigis la tablojn per bongustaj pladoj. Komuna foto apud la ŝildo de la vilao eternigis niajn vizaĝojn. Freŝigitaj de

la pura montara aero ni gaje ekmarŝis returne.

Estas menciinde, ke la veterano Aleksandro Nakov memstare lernis la Internacian Lingvon kaj nun li estas la plej arda kontraŭulo de la „krokodilado“ dum niaj kunvenoj. Per sia sindona kaj modesta konduto la jubileulo meritis nian admiron kaj gajnis niajn korojn.

Cveta POPOVA

Nuni Nanev kantas antaŭ plena salono

S-ro Nuni Nanev, 1-a tra la tuta kontinento bonkonata kantisto de la opero de Sofio, estas bona esperantisto, kaj per sia distinga kantarto li plenumas gravan rolon en la propagando por nia lingvo. La partoprenintoj de la Esperanto-kongreso en Malmö sendube memoras lian plaĉan dolĉan voĉon.

La 17-an de septembro Nanev prezentis antaŭ tutplena salono en la HSB ejo en Stockholm koncerton tute en Esperanto. En zorge farita elekto de arioj, kantoj kaj popolkantoj la bulgara kantstelo montris plej altrangan voĉon kaj muzikan arton. La plej distinga signo de lia voĉo estas la spiridelikata, sed ĉiam sonora piano-pianismo kaj la bela sonkoloro en la mezaj kaj altaj registroj. Kantoj de Caccini, Mozart, Schubert kaj Ĉajkovskij estis pura travivaĵo, kaj precipe en la sonĝrakonto el „Manon” de Massenet nia bonkantanta Esperanto-amiko montris senpenan spirteknikon kaj efikan mezovoĉon, kian ni malofte aŭdis. La dua parto de la programo estis rezervita por la popolkantoj, el kiuj la rusa „Sonorilo” ensorĉis la publikon.

Oni devas konfesi, ke Esperanto bone taŭgas por kantado, kaj ĝi posedas la saman esprimeblecon kiel iu ajn nacia lingvo.

Pro la ovacia aklamado de la publiko la simpatia sudlandano surprizis la aŭskultanton per kantado de „Sverige” de Stenhammar svedlingve.

Nanev estis brile akompanita sur fortepiano de sia bela, blonda edzino, sinjorino Ingeborg. Cetere estas ŝi, kiu plej lerte regas la Esperantan lingvon en la Nanev-familio, kaj kiel pruvon oni povas menci, ke ŝi tradukis ĉiujn italajn, rusajn, bulgarajn, hispanajn kaj alilingvajn kantojn, kiujn kantas ŝia edzo.

(El „Svenska Esperanto-Tidningen.
La Espero”, N 10, 1948)

TELEKOPIE DE „LA ESPERANTISTO” EN SOFIO

Je la 1-a de septembro 1989 en la Centra Poŝtoŝicejo en Sofio alvenis telekopio de la unua numero de aperinta precize antaŭ 100 jaroj unua esperantista periodaĵo — gazeto „La Esperantisto”. Ĝi estis eldonata en Nürnberg de Christian Schmidt kun kunlaborado de Zamenhof mem.

Komence „La Esperantisto” havis nur 113 abonantojn, sed ĝi rapide trovis sian legantaron kaj estiĝis forta komunikilo por la esperantistoj el tutmondo. Plej multe da abonantoj estis en Rusio kaj Francio. Sed en numero 2/1895 Zamenhof aperigis artikolon de Leo Tolstoj, pro kio la cara cenzuro en Rusio malpermesis la disvastigon de la gazeto en la lando. Baldaŭ ĝi, senigita je financa subteno, ĉesis aperi.

Sur la unua paĝo de „La Esperantisto” oni povas tralegi „Prospekton”, en kiu estas montritaj la celoj kaj la taskoj, kiujn starigis antaŭ si la eldonantoj. La artikolo estas en tri lingvoj — germana, franca kaj Esperanto.

La improvizan solenaĵon, dum kiu la redakcianoj de gazeto „Paco” ricevis la telekopion, ĉeestis reprezentantoj de BEA kaj sofiaj esperantistoj. Por la ĵurnalistoj el la Televizio, Radio kaj nacia gazetaro la ĉefredaktoro de „Paco” Violin Oljanov faris koncizan skizon de Esperanto-movado, emfazante la porpacan rolon de la esperantistoj en la internaciaj rilatoj. Li menciis ankaŭ, ke baldaŭ bulgaraj esperantistoj festos gravan jubileon — la 100-an datrevenon de apero de la dua esperantista gazeto — „La Mondlingvisto”, eldonita en Sofio en decembro 1889.

Raportaĵojn pri la evento elsendis en la sama tago bulgaraj Radio kaj Televizio, artikolojn aperigis kelkaj el la ĉefaj tag-ĵurnaloj en la lando.

La telekopio de „La Esperantisto” estis transdonita al Bulgara Esperanto-Muzeo.

Veneta BALEVA

Al la verkemuloj

Unu el la ĉefaj lingvaj specifikaĵoj de Esperanto estas la ege riĉaj eblecoj por vortfarado per sufiksoj. Jam de longe la **uzado de neologismoj** vekis akrajn disputojn. La neologismemuloj pledas por kreo de „poëzia lingvaĵo“, kiu ekzistu apud la „ĉiutaga Esperanto“. Aliaj gesamideanoj defendas la vortokrean kapablecon de la sufiksaro kaj insistas pri relative malgranda vortaro. La disputo ne atingis objektivon kaj pro tio la problemoj ĝis nun ne solviĝis, sed mi opinias, ke estas nekontesteble, ke la senorda, senlekta uzado de neologismoj perfortas la naturan evoluon de la lingvo. Se ĉiuj komencas, laŭ propra konsidero, enkonduki novajn vortojn, Esperanto perdos la atingitajn per tiom da penoj poziciojn. Bedaŭrinde, en multaj poemoj, kiujn ni lastatempe ricevis, svarmas neologismoj, lernitaj parkere kaj

senkritike de iuj „modernaj“ aŭtoroj aŭ simple elpensitaj. Fakte, preskaŭ ĉiam temas pri ne tute bona kono kaj apliko de la riĉecoj de klasika Esperanto.

Alia ofta malperfektaĵo de multaj el la ricevitaj poemoj estas **la nekutima gramatiko**. Ĝi povas doni specialan guston, tamen tordo de frazoj por atingi plejparte rimon, sed neregule-ritman strukturon, pli ĝenos ol subtenas la versaĵojn.

Kaj la tria malperfektaĵo de multaj el la senditaj de vi poemoj: elementa evidentaĵo estas, ke **la uzado de samradikaj rimoj** (riĉaĵo — bonaĵo, beleco — amikeco, belega — grandega ktp.) signalas mallertan versofaradon kaj krean malfortecon. Ĉiam serĉu freŝajn, originalajn, neatenditajn rimojn! Kaj evitu la tiel nomatajn neplenajn rimojn, t. e. la rimoidojn!

Apartajn interesajn lokojn mi trovis en la poemoj, senditaj al ni de **A. L. el vilaĝo Aleksandrovo (departemento Loveĉ), N. N. el Dve mogili, C. U. el Sofio, S. S. el Plovdiv, M. L. M. el Aviles (Hispanio)**, sed en ĉiuj estas superfluaĵoj, babilemo, neoriginala bildeco, trivialaj rimoj, malsukcesaj provoĵoj por metaforoj. Klopodu krei modernajn verkojn, evitante tro eksmodajn, arkaiĝintajn skemojn, siropaĵojn.

Dum ĉi lastaj monatoj ni ne ricevis eĉ unu beletran verkon. Kio okazis? Ĉu niaj beletremuloj perdis inspiron aŭ ili ne plu fidis la diskonigan, disfamigan forton de nia revuo?

Do, ĝis ricevo, karaj legantoj kaj verkemuloj. Kaj bonan verkadon!

Venelin MITEV

INTERNACIA ŜAK-FESTIVALO

La XVI Internacia Esperanta Ŝak-Festivalo okazis en la ĉefa urbeto Jablunkov. En ĝi partoprenis amatoraj ŝak-esperantistoj el 6 landoj: Anglio, ĈSSR, GDR, Hungario, Sovetunio, Usono. La turniro trapasis amikeme kaj organizite. Ĉiuj partoprenantoj dankis al Jaromir Canibal, prezidanto de Esperanta Ŝak-Ligo Internacia (EŝLI).

La unuan lokon okupis W. Woll, kolektante 6 poentojn kaj duono el 8. B. Lanin kaj J. Serbiņa (ambaŭ

el Sovetunio) kolektis po $5\frac{1}{2}$ poentojn.

German MURAVJEV,
Leningrad



La partoprenantoj de XVI Internacia E-Ŝakturniro.



Pontoj de amikeco

Esperantistoj estas homoj scivolemaj, societemaj. Ili volas esti ĉie, vidi maksimum! Al gento de la maltrankvilaj apartenas kaj Vladimir Ĵelev el Plovdiv. Imagu mem. Lekcianta en Plovdiva Rekapabla Centro, kiu celas revenigi al plenvalora vivo homojn, kiuj perdis vidkapablon jam kiel plenkreskuloj, Vladimir samtempe estas gvidanto en Kulturdomo de blindaj esperantistoj. Li, mem invalido je vidkapablo, scipovas trovi la tempon kaj eblecon por multaj vojaĝoj, inter kiuj specialan lokon havas en lia vivo veturado al Ukrainio. Li ŝatas veturi kun familio, ja lia edzino Maria Havrilivna naskiĝis en Kiev. Ŝia frato Leono loĝas en Lvov, de la edziĝparo Ĵelev-oj ofte vizitas la urbon.

Ĉi tie feliĉa sorto kunigis la bulgaran vaganton kun Juliano Vovk, artgvidanto de du popularaj muzik-kolektivoj: Kapelo de banduristoj „Karpatoj” kaj voĉ-instrumenta ensemblo „Strumoĉok” (Rivereto), ĉe Lvova Laborista Entrepreno por Blinduloj (LLEB) de Ukraina Asocio de Nevidantoj. Ĝustaloke diri, Julian Jaroslavoviĉ ankaŭ estas persista esperantisto, do interkonatiĝi kaj amikiĝi por ili ne estis problemo.

Kaj pensis Juliano: „La banduristojn kaj la junulinojn el „Strumoĉok” konas homoj en urboj kaj vilaĝoj de Ukrainio, kie la blindaj popularigantoj de ukrainaj kantoj estas oftaj gastoj. Favore renkontis nian arton amikoj en Litovio, Moskvo, Leningrado... Sed en Bulgario ni ankoraŭ ne estis. Do, antaŭ ol pretigi nin veturi al Plovdiv, necesas por pli proksima interkonatiĝo inviti la ĝemel-urbanojn al ni”.

Al Vladimir Ĵelev la ideo ekplaĉis. Subtenis ĝin kaj gvidantoj de la societo kaj klubo. Kaj jen karaj gastoj, ĉirkaŭ 90 personoj, eltrajniĝis en junio k. j. sur Lvovan kajon.

Oni loĝigis ilin en lerneja komunloĝejo por blindaj infanoj N-ro 100, lernantoj el

kiu jam disiris ferii. La unuan koncerton Plovdiva ĥoro prezentis en plenplena klubo de LLEB. La spektantoj per sincera aplaŭdado dankis al la senditoj de Bulgario. Poste ili koncertis en aliaj entreprenoj de la urbo. Ĉie neŝanĝeblan sukceson havis solistino de la ĥoro Maria Kirova, kiu sentoplene, kiel sian gepatran, prezentis ukrainan popolan kanton „Ĉorniji brovi, kariji oĉi” („Nigraj brovoj, brunaj okuloj”).

La dommastroj montris al la gastoj sian fieraĵon — la antikvan, sed ĉiam novan Lvov, kaj tiuj ne kaŝis sian admiron.

En konsisto de la plovdiva delegitaro estis negranda, sed bone kunordigita muzika E-ensemblo, sub gvido de Veliĉka Karparova. Ĉi tiu fama en sia lando blinda poetinokantistino verkas ne nur poemojn, sed ankaŭ melodiojn por siaj kantoj, kiuj okupas ĉefan lokon en la repertuaro de la ensemblo. Interalie, la ensemblo dufoje gajnis titolon de laŭreato en la revuoj de Esperanta parolo kaj kanto, kiuj jam fariĝis tradiciaj en Bulgario.

Ĉar inter Lvovaj blinduloj ĝis nun, bedaŭrinde, estas malmulte da esperantistoj, por renkonto kun la plovdivanoj venis en la lernejan komunloĝejon membroj de Lvova Esperanto-Klubo „Primavero”. Prezidanto de la klubo profesoro Aleksandro Koroleviĉ salutis la gastojn de nia urbo kaj mallonge rakontis pri agado kaj hodiaŭaj klopodoj de la organizaĵo. Vladimir Ĵelev informis la ĉeestantojn pri atingoj kaj planoj de plovdivaj esperantistoj.

Kaj sonis en la Internacia Lingvo kantoj pri Bulgario. Jen vastaj, longsonaj, similaj al niaj „dumoj” (pensoj) pri lukto de la popolo kontraŭ turkaj malliberigantoj kaj faŝismaj subpremantoj; jen bravaj, junecaj, veraj atestantoj pri viva forto de la loĝantoj



Foto de la numero: Unu el la sofiaj magazenoj de Bulgara Esperanto-Kooperativo.

Foto: Aleksej DIMITROV.

ĉe Danubo kaj Rodopi-montaro. Poste sekvis tipaj Esperantaj kantoj: pri la verda stelo — simbolo de espero, pri la Internacia Lingvo — ponto de amikeco inter diverslingvanoj el malsamaj gentoj kaj rasoj.

Por memoro pri la renkonto la gastoj kaj la dommastroj interŝanĝis memoraĵojn. La bulgaroj donacis al Lvova E-Klubo jubilean gramofondiskon kun operaj arioj kaj Esperantaj kantoj de nuntempaj komponistoj, dediĉitan al la 100-jariĝo de Esperanto, en prezento de la fama bulgara kantisto Veselin Damjanov. Reciproke ili ricevis: bareliefon de L. L. Zamenhof fare de Lvova skulptisto profesoro Emanuilo Misjko kaj raran libron, en kiu „Testamento” de Taras

Ŝevĉenko estas publikigita en 167 lingvoj, inter kiuj en bulgara kaj Esperanto.

— Sajnas al mi, ke mi estis en Hispanio — kun ravo rakontis pri siaj impresoj laboristo el LLEB Miĥajlo Kohut. Esperanton li lernis neniam, sed la sencon de la aŭdaĵo li kaptis kontentige kaj esprimis tre trafe. Ja en konsisto de la Internacia Lingvo estas multe da vortoj, radikoj, kiuj devenas de romidaj lingvoj, do ankaŭ de la hispana...

La Lvovanoj adiaŭis la amikojn la 24-an de junio k. j. La triston de la disiĝo helpis superi espero pri nova renkonto. Ĉi-foje jam en gastama Plovdiv.

N. KRASJUK,
Lvov, USSR

POSET'89

Ĉi-jare 17 esperantistoj el Gabrovo, Sliven, Sofio, Ĥaskovo kaj Ŝumen partoprenis en la V Somera Renkontiĝo en Potsdam „POSET'89” (29.07.—06.08.89). La organizantoj — esperantistoj el potsdama departemento, proponis tre utilan programon, inkluzivantan krom la diskutrondoj pri Esperantaj problemoj ankaŭ vizitadon de rimarkindaj arkitekturaj kaj historiaj monumentoj, muzeoj, artaj ekspozicioj, koncertoj. Estis organizitaj ekskursoj al Berlin, Brandenburg kaj tra la pitoreskaj ĉirkaŭaĵoj de Potsdam.

Dum la improvizitaj folkloraj vesperoj sonis popolkantoj en naciaj lingvoj kaj Esperanto.

Pere de projekciado de diapozitivoj ni konatigis niajn eksterlandajn geamikojn kun la vidindaĵoj de nia lando. Okazis novaj konatiĝoj, invitoj por gastado.

Kiel oni povus nomi ĉion ĉi, se ne popola diplomatio je la intereso de paco kaj internacia kompreniĝo?

ing. Stefan GEORGIEV,
Ŝumen

Sukcesa jarmeza semajnfino

La Distrikta Estraro Leipzig de GDREA estis invitinta esperantistojn el la tuta mondo al Jarmeza Esperantista Semajnfino sur la tereno kaj en la kadro de Agrikultura Ekspozicio (AGRA) de GDR. Rezulte de tio de la 23-a ĝis la 25-a de junio 1989 kunvenis 250 esperantistoj el 11 landoj. Ili travivis solenan aranĝon okaze de la ŝtatjubilao de GDR kaj honore al la germana heroo Thomas Müntzer.

Enkadre de solena Mozart-muzikaĵoj festprelegis kaj deklamis Wera Blanke, Manfred Arnold kaj Fritz Wollenberg. Okazis ok fakaj prelegoj en Esperanto, el tre vasta temaro, inter alie pri „Nutraĵo el la

maro” (Burmeister/Hofmann), „Bonsai — envazaj miniaturaj pejzaĝoj” (B. Mann), „Abelbredado kiel mia hobiaĵo” (A. Fichtner), „Pejzaĝoj post karbominado” (d-ro Werner), „Redaktado de faka ĵurnalo” (d-ro Hradil), forstmastrumado (I. Ullrich), „Vivtenado de la arbaroj” (d-ro Simon), „Medioprotektado” (R. Schindler). Ni gvidis la partoprenintojn al diversaj objektoj de la ekspozicio, kaj speciale multajn impresis la bestoparado. Vespere venkis la societemo.

La aranĝo alportis multajn travivaĵojn kaj vekis grandan publikan intereson.

Michael BEHR

Por regula, ĝusta lingvouzo

En n-ro 6 de „BE” mi estis malgrable frapita de la uzo de la vorto „distinguloj”. Ĝi estis plurfoje uzita en la informajo pri la premiitoj en la XX Nacia Revuo de Esperanta Kanto kaj Parolo. Mi tuj devas diri, ke la kulpo ne apartenas al la Redakcio, evidente la listo kun la uzitaj terminoj tiel estis prezentita al ĝi de la ĵurioj de la revuo.

En Esperanto iuj sufiksoj havas pasivan signifon, aliaj aktivan. Al la unua grupo apartenas la sufiksoj -ebl-, -ind-, -end-, -iĝ-. La sufikso -ebl- signifas ion, kio povas esti -ata (-ita) — ind-, -ion, kio meritas esti -ata (-ita) ktp. Jen:

Legebla teksto (kiu povas esti legata);

gratulinda esperantisto (kiu meritas esti gratulita);

lernenda materialo (kiu devas esti lernita);

elektiĝis nova prezidanto (estis elektita).

Al la dua grupo (kun aktiva nuanco) apartenas la sufiksoj -il-, -ist-, -ul-, -em-, ig. La sufikso -il- signifas instrumenton, per kiu oni -as; -ist- — homo, kiu regule laboras ion, efektivas ion; -ul- — homo havanta ian kvaliton, kiu karakterizas lin; -em- — iu (aŭ io), kiu estas inklina fari ion. Jen:

hakilo — instrumento por haki;
instruisto — homo, kiu instruas;

am(em)ulo — homo, kiu estas inklina ami;

lernema knabino — kiu ŝatas lerni ktp, ktp.

El la diritaĵo sekvas, ke „distingulo” estas, kiu kutime distingas, kiu ŝatas kaj povas distingi. Same amulo — kiu konstante okupiĝas pri amado; pensulo — homo kiu pensas; ridulo — kiu konstante ridas; batulo — kiu ofte batas...

Homo, kiun oni distingas estas distingito, samkiel homo kiun oni batas, estas batito (en neniu okazo „batulo”).

Violin OLJANOV

Balasta neologismo

En sia artikolo „Samito” — ĉu vere balasto?, publikigita en „Esperantisto Slovaka”, n-ro 1/1988, A. Bednařík pledas por enkonduko de la neologismo **samito**, kontraŭe la tezon de Bernard Golden, ke **samito** estas balasta neologismo, defenditan en lia artikolo „La balasta neologismo **samito**”, publikigita en „Esperantisto Slovaka”, n-ro 1/1987.

Baza argumento de A. Bednařík estas la internacieco de la angla vorto **summit** (prononcu **samit**). Li asertas, ke kiel en la ĉeĥa kaj slovaka la ĵurnalistoj uzas krom la naciolingvaj esprimoj ankaŭ la mallongan **summit**, tiel same en aliaj lingvoj oni uzas kaj la hejman esprimon kaj la pli aŭ malpli adaptitan anglan **summit**. Li konkludas, ke **summit** estas sufiĉe internacia vorto kaj oni rajtas uzi ĝin laŭ la 16-a regulo de la Fundamenta Gramatiko.

La dua argumento de Bednařík estas, ke la vorto **samito** havas kelkajn avantaĝojn: 1. ĝi estas oportune mallonga do sekve facile derivebla (samitanoj, samit-urbo, samiti en Rejkjaviko), 2. ĝi ne estas plene sinonima kun la priskribaj plurvortaj esprimoj (konferenco je supra nivelo), ĉar ĝi kiel hiperonimo povas

signifi kaj konferencon, kaj kunvenon, kaj konsultiĝon k. a.

Koncerne la argumenton pri la internacieco de la vorto „summit” mi emas diri, ke la internacieco estas tute relativa. Ekzemple en la ruslingvaj sovetiaj gazetoj, same kiel en la bulgaraj, mi ne konstatis okazojn de uzo de **summit**. En la rusa kaj la bulgara lingvoj, simile al la ĉeĥa kaj slovaka lingvoj estas uzataj propraj esprimoj: konferenciĵo, vstreĉa na višem urovne (rusa), konferenciĵo, sreŝta na visoko ravniŝte (bulgara) — konferenco, renkontiĝo je supera nivelo.

Krome, kial estas necese doni verdan straton al la neologismo „samito”, kiam en Esperanto ekzistas la vorto pinto, apartenanta al la Universala Vortaro, ekvivalento de la vorto **summit**, kiu povas esti uzata en kombino kun la vortoj konferenco, renkontiĝo, intertraktoj, dialogo k. a., aŭ eĉ memstare kaj do havi ankaŭ hiperoniman karakteron? Kaj tiu ĉi vorto estas jam uzata en kombino kun aliaj vortoj aŭ memstare fare de Esperantaj ĵurnalistoj. Ekzemple, elstara bulgara ĵurnalisto Nikola Aleksiev en sia artikolo „Esperigaj paŝoj al tutmonda paco” en n-ro 151/1988 de „La Pacaktivulo”, parolante pri la kvara renkontiĝo de Gorbaĉov kaj Reagan, okazinta en

Moskvo en 1988, uzis la kunmetaĵon **pintrenkontiĝo**. Doc. d-ro Adam Sudel en sia artikolo „Influo de la publika opinio al la procezoj de malstreĉiĝo, senarmiĝo kaj interkompreniĝo de la popoloj”, aperigita en n-ro 6/1988 de „Paco”, parolante pri la unua renkontiĝo de Gorbaĉov kaj Reagan en Genevo en novembro 1985 uzis la esprimon „**pinta**” **renkontiĝo**. En la sama artikolo denove pri la sama renkontiĝo li uzis memstare la vorton „pinto” en la senco de „pinta renkontiĝo” (La monda publika opinio ludis gravan rolon en atingado de tiu „pinto”). Sekve, la vorto „pinto” kun la figura senco de la angla vorto **summit** jam penetras en la Esperantan gazetaron. Kaj mi estas certa, ke tiu ĉi vorto, uzata en kombino kun aliaj vortoj aŭ kiel kunmetaĵo kun aliaj vortoj, samkiel memstare kun hiperonima signifo, estas tute komprenebla al ĉiuj esperantistoj, sendepende al kiu nacia lingvo ili apartenas.

Forfalas ankaŭ la ceteraj du argumentoj favore al la enkonduko de **samito**. La vorto „pinto” estas eĉ malpli longa ol **samito**. Ankaŭ ĝi povas havi hiperoniman signifon.

Do, la neologismo **samito** estas vere balasto.

Dimităr HAĜIEV

Vanga

Krasimira STOJANOVA

(Daŭrigo de n-ro 10/89)

Nun ni ilustru la lakonajn respondojn de Vanga per ekzemploj el ŝiaj ĉiutagaj seancoj:

Vanga estas pia kaj kredas, ke ekzistas Dio. Sed al la demando de la ĵurnalisto K. K. (mi surbendigis la interparolon kaj posedas la bendon) en 1983, ĉu ŝi iam vidis Jesuon Kriston, ŝi respondis: „Jes, sed li ne havas figuron. Tio estas grandega fajra globo, kiun oni ne povas rigardi pro la forta lumo. Nur lumo. Nenio alia videblas. Se iu dirus al vi, ke li vidis Dion, vi sciu, ke tio ne estas vero”.

Vanga renkontiĝas kun multaj kleraj homoj, kaj fine, post la renkontiĝo, ili forlasas la domon tre mirigitaj pro ĉio aŭdita kaj dirita. „Kiel mi komprenu tiun miraklon? — demandadis post la renkontiĝo kun Vanga iu granda sovetia sciencisto, lia nomo estis Miĥajlov. — Kiel Vanga kontaktis mian patrinon, kiu mortis antaŭ pli ol 10 jaroj? Ĉu la morta cerbo povas doni informojn?”

Al Z. M., kuracistino el USSR, Vanga rakontis pri kuracistoj el plej antikvaj tempoj kaj pri iliaj kuracmetodoj. Elirante, la virino demandis min ege mirigita: „Sed kiel tio eblas, de kie ŝi povas scii la nomojn de tiuj tiel delonge mortaj kuracistoj?”

Al la konata bulgara historiisto N. G. ŝi detale parolis pri la vivo sur niaj teritorioj dum la XII jarcento, kvazaŭ ŝi legus libron. La sciencisto mem poste diris, ke ŝi rakontis pri aferoj, kiujn li antaŭe ne konis, kvankam li estas konsiderata unu el la plej kompetentaj fakuloj pri tiu epoko.

Grupo da junuloj estis ŝtelinta valorajn ikonojn de iu monaĥejo. Ili okupiĝis pri restaŭrado kaj havis aliron al la monaĥejo kaj al la preĝeja havaĵo. Ili inside estis misuzintaj la konfidon de la monaĥeja estraro. Vanga tuj senmaskigis ilin kaj kun frapanta precizeco rakontis al ĉiuj ĉeestantoj, kiel la junuloj planis la ŝtelon.

Juna virino rakontis al mi: „Multajn jarojn nia tuta familio loĝis en malnova kataka dometo. Foje mi demandis Vanga-n, ĉu ankaŭ ni havos normalan domon. Ŝi diris: „Jes, mi vidas domon, sed estas nur fenestroj, sen fundamento”. Mi ne komprenis tion kaj ekatendis. Post ĉirkaŭ du monatoj, revenante hejmen de la laborejo, mi vidis fum- kaj polvonubojn antaŭ nia domo. Mi ekrapidis kaj terurita mi vidis, ke nia malnova domo detruigis (apud ĝi estis konstruata nova domo kaj la konstruistoj subfosis nian domon — tio estis konstatita poste), la fundamentoj ruiniĝis, kaj de la supra etaĝo en la aero pendis la fenestroj, nekompreneble kiel fiksitaĵ...”

Vanga diras:

— Se mi dirus al la homoj ĉion, kion mi vidas kaj scias, ili tuj ekdeziros forlasi tiun mondon.

Ŝi strebas per ĉiuj rimedoj konservi la disfalantajn familiojn; ŝi plej bone vidas kaj scias, ĉu pravas tiu kiu, konsideras sin trompita kaj maljuste traktita. Ŝi pacience aŭskultas ĉiujn kaj poste diras sian opinion sen timo, ke iu povas esti malkontenta aŭ ekmalami ŝin pro tio, ke ŝi severe riproĉas lin.

Foje ŝiaj blindaj okuloj larĝe malfermiĝas kaj dum minutoj ŝi kontemplas ion, kio moviĝas, ŝi sekvas ĝin per rigardo, kaj poste ŝiaj okuloj denove fermiĝas. Ofte ŝi ekdormas dum niaj interparoloj. Foje mi deziris distri ŝin kaj laŭtleĝis al ŝi libron, kiun mi estis kunportinta. Jam en la komenco ŝi ekdormis. Mi rimarkis tion kaj ĉesis legi, sed ŝi diris: „Daŭrigu!” Post kelkaj paĝoj ŝi vekigis kaj diris: „Estas bone verkite, sed ne veras. Mi transportiĝis malproksimen por vidi, ĉu tio estas vero, sed ne estis tiel”. La libro estis je historia temo.

Ni vidas kaj imagas ion, sed ŝi vidas kaj imagas tute aliajn aferojn. Ŝi foje ekaŭskultas, sidante apud la floroj, kaj poste diras: „Se vi scius, kion ĵus diris al mi la pelargonio: „Mi estas kuracilo kontraŭ nervaj malsanoj, rekomendu min!”

Sed kiel Vanga vidas ĉion ĉi? Kia estas la mekanismo de perceptado kaj reproduktado?

Vanga diras: „Kiam iu homo ekstaras antaŭ mi, mi havas la senton, ke en mia kapo malfermiĝas fenestro, tra kiu mi observas bildojn, kaj la vivo de la homo trapasas antaŭ miaj okuloj kvazaŭ sur filmbendo, kaj super mi aŭdiĝas voĉo, kiu diras, kion mi parolu”.

„Jam en 1971 mi diris al la pentristino Sui — ĉinino, edziniĝinta al bulgaro: „Venos la tago, kiam vi denove revenos en sian landon”. Kiam ni unuafoje renkontiĝis, kvazaŭ granda fenestro malfermiĝis antaŭ mi, kaj mi vidis belegan naturon — arbojn, kampojn kaj malaltajn dometojn, kaj la homoj surhavis pantoflojn el ŝnuro. Kia bela lando! Kaj poste mi diris al Sui: „Via infano estas paralizita, sed nur vi povas helpi al ĝi. Mi vidas, ke ĝi plene resaniĝos”. Poste Sui

veturis al Ĉinio, studis tie akupunkturon kaj poste mem resanigis sian infanon. Mi aŭdis, ke nun ŝi denove estas en sia patrolando kaj estas tre feliĉa”.

Foje ŝi renkontiĝis kun la pentristo Svetoslav Rjoriĥ el Hindio, kaj la unua bildo, kiun ŝi vidis, estas granda florpoto en lia ĉambro, en kiu floris granda, bela blanka lilio, kaj ŝi diris: „Tio estas la plej granda spirita ornamo de via domo. Kvazaŭ denove en mi malfermiĝis granda fenestro kaj per sia majesteco ekbrilis la arĝentkoloraj pintoj de Tibeto kaj Himalajo. Kia beleco! Tie, en tiu regiono estas la plej malnova historio de la homaro. Via patro estis simple netera homo: Li estis pentristo, sed ankaŭ multe pli ol tio. Ĉiuj liaj bildoj estas profundaj ekkonoj. Vi devas daŭrigi lian aferon.”

(Daŭrigota en n-ro 12/89)

ORIGINALA VERKARO

Julian MODEST

* * *

Al G.

*Torenta pluvo, friska vento.
Sub la pluvo vi kaj mi,
feinaj kisoj, suna sento...*

*Dezerta kajo, verda lumo,
trajno foras pli kaj pli...
Sub perla pluvo — kisa suno.*



MEMORE AL MARIA ANGELOVA

Nur horojn antaŭ sia morto ŝi verve rakontis al mi pri sia antaŭnelonga partopreno en la Nacia Kongreso de Hispana Esperantista Federacio en Bilbao — kion ŝi kantis, kiel varme estis akceptita fare de hispanaj gesamideanoj kaj kiel bone ŝi sentis sin. Denove ni konkludis: dankon al tiu ĉi nia esperantista riĉa sorto. Kaj mi ne sciis, ke en tiuj lastaj tagoj de aŭgusto 1989 estas nia lasta interparolo, nia lasta esprimo de amikeco, nia lasta renkontiĝo.

Kial do „lasta“?! Preskaŭ dudek jarojn Maria ĉeestas en mia memoro. Antaŭ ĉio per sia kanta arto: profesia kamera soprano kun voĉo tenera, plenumo preciza, kantado kultura, ŝia repertuaro en Esperanto inkluzivis ariojn el klasikaj operoj, kantojn de klasikaj kaj nuntempaj komponistoj (iuj el ili komponis por ŝi laŭ originala Esperanto-poezio), artajn popolkantojn, konatajn esperantistajn kantojn. Ŝiaj plenumoj antaŭ esperantista publiko ne eblas esti kalkulitaj: ĉe kunvenoj, ĉe festoj, ĉe naciaj kongresoj, ĉe alilandaj aranĝoj, ĉe kongresoj de IFEF, ĉe kongresoj de UEA. En multaj urboj de Bulgario ŝi kantis, en Italio, en Ateno, en Hamburgo, en Rejkjaviko, en Londono, en Roterdamo, en Kopenhago, en... per duetoj kun la ŝatata bari-



tono Veselin Damjanov, kun la tenoro Dimităr Denĉev. Kaj nun ŝi lasis por ni, siaj aŭskultantoj, sian propran voĉon sur gramofondisko.

Maria aktivis en la arta kaj organiza agado de BEA. Kiel sindone, lerte ŝi helpis la preparlaboron de lernantoj — junaj esperantistoj por la revuoj de E-kanto kaj parolo. Kaj la ofte gajnitaj unuaj premioj estis por ŝi la rekompenco.

Ni kune laboris en la Komisiono pri virina agado ĉe BEA. Kolego kun aŭtoritata pritakso, je kies agado oni povis tutcerte kalkuli.

Amikino kara, adiaŭ!

Al viaj ŝatataj infanoj — filino kaj nepino — niajn sincerajn kondolencojn!

Belka BELEVA

Anoncoj

● Esperantistoj-invalidoj de ĈEA invitas al solena renkontiĝo omaĝe al la 5-a datreveno de sia fondiĝo. La renkontiĝo okazos de la 8-a ĝis la 11-a de junio 1990 en Slaný, Ĉeĥoslovakio.

Informojn petu de:
Esperantistoj-invalidoj, P. K.
63, CS—274 Ol Slaný, ĈEĤOSLOVAKIO.

● Korespondemuloj! Sendu vian anonceton por senpaga aperigo en eldonaĵo „KORESPONDI“. Por ricevi specimenon aŭ pruvekzempleron sendu 3 internaciajn respondkuponojn aŭ DEK francajn frankojn aŭ DU usonajn dolarojn al la eldonanto: R. MELO, 34, Avenue de Russie, F—03700 BELLERIVE s/Allier, Francujo.

● Deziras interŝanĝi monbiletojn senvvalorajn aŭ malmultekostajn. Povas pagi ankaŭ per libroj, PK aŭ PM. Respondo garantiata. Adreso:

Odeni BARBOSA
Caixa Postal 794
BR 89800 Chapecó SC
BRASIL

NI KONDOLENCAS

Antaŭ nelonge E-societo „Radio“ en Pazarĝik perdis du el siaj veteranoj.

Panajot At. Demirev, naskita la 2-an de junio 1909 en Pazarĝik, forpasis la 25-an de aprilo 1989. Li estis fidela kaj aktiva societano, multjara membro de kontrola komisiono ĉe la societo.

La 26-an de junio forpasis la dentkuracisto Dimitrija Baraklijska, naskita la 28-an de oktobro 1906 en Pazarĝik. Ŝi kaj P. Demirev partoprenis ankaŭ kelkajn UEA-kongresojn.

Ilia forpaso estas granda perdo por nia societo, kiu estime kliniĝas antaŭ ilia hela memoro!

Estraro de E-societo „Radio“,
Pazarĝik



Enlanda movado

MARE'89

Jam por la deka fojo en Varna oni organizas sukcese Mara Amika Renkontiĝo Esperantista (MARE). Dum la kunsido de la Estraro de Esperanto-societo „Albatroso” — la 29-an de marto j. k. oni decidis, ke ĉi-jare „MARE'89” koincidu kun la 85-jara jubileo de „Albatroso”. Ĝustatempe oni dissendis leterojn, programojn al ĉiuj Esperanto-societoj kaj Esperanto-kulturdomoj en la lando, al CE de BEA kaj al ĉiuj esperantistoj en nia urbo. La partopreno estis amasa.

La granda salono de la Domo de Popola Floto estiĝis malvasta, samkiel la restoracio „Sevastopol”, kie okazis la tradicia vespermanĝo kaj interkona vespero.

La raporton pri la 85-a datreveno de la fondiĝo de loka Esperanto-societo redaktis doc. Georgi Dimov, Stefan Apostolov kaj Ilija Panajotov, kaj ĝin tralegis inĝ. Stojka Uzunova — prezidantino de „Albatroso”. La solenaĵo estis gvidata de Virĵinija Kirčeva. Oni sendis telegramon al la CE de BEA.

Kortuŝa estis la gratulo de la reprezentantino de Letnica — regiono de Loveĉ, Dobrinka Ivanova, kiu transdonis al la prezidantino de „Albatroso” simblan donacon — 85 freŝajn diantojn. La solenaĵon salutis Bronius Baltrunas je la nomo de la Popola Pupteatro el Litovio. Aliaj gratuloj mankis. Reprezentanto de CE de BEA ne partoprenis nian grandan feston.

La belarta programo estis riĉa kaj varia. Partoprenis la Popola Pupteatro el Panevenius — Soveta Litovio



Ero de la arta programo



Komuna foto

kun reĝisorino Julia Stepankiene. La artistoj prezentis la komedion „La perditaj notoj” de Vauĉiunajte; pentristo Albertas Stepenska. La artprogramon partoprenis ankaŭ Dimităr Petkov el Gorna Orjaĥovica, estrada kolektivo el Jambol kun gvidantino Liljana Paraŝkevova, ensemblo por politikaj kantoj el Karnobat kun gvidantino Janka Stojanova. Recitis junuloj el Botevgrad (gvidantino Stamenka Bojanova) kaj prezentis sin amatora teatro el Stara Zagora. La programo inkluzivis ankaŭ la humuraĵon „Bone — malbone” (gvidantino Violeta Manojan el Varna) kaj Esperantajn kantojn plenumitajn de trio Boris Budiĉev (blindaj geesperantistoj el Varna). Gvidantoj de la programo estis la geedza paro Violeta kaj Mateos Manojan.

Florkronojn oni metis ĉe la monumento de Georgi Dimitrov je la nomo de Esperanto-societo „Albatroso” kaj la klubo de la veteranoj-esperantistoj „Mois Levi”.

La 18-an de junio j. k. okazis ekskurso. En ĝi partoprenis 65 personoj. Oni vizitis la feriejon „Albena”, la palacon kun la riĉa botanika ĝardeno en urbo Balĉik. La ekskurso efektiviĝis per ŝipo kaj per aŭtobuso.

Dum la tagoj de la solenaĵo estis organizita interesa ekspozicio de bildkartoj el la tuta mondo de Dimitrina Ruseva el klubo „Fervojisto”.

En la kadroj de „MARE'89” (la 17-an de junio) okazis Pedagogia konferenco en la IV Lingva Gimnazio „Frédéric Joliot — Curie” en Varna. La konferenco malfermis kaj bondeziris sukcesojn la direktorino de la gimnazio Trānkova. En la konferenco partoprenis per prelegoj Kremona Bāceva kaj Georgi Miĥalkov, ambaŭ el Sofio. Kr. Bāceva parolis pri interferado de la lingvo kaj vortfarado en Esperanto. Ŝia parolado es-

tis mallonga, sed instrua kaj elokventa. Mi fieras, ke iam Bâceva en Meden Rudnik (nun kvartalo de Burgaso) eklernis Esperanton en mia Cseh-kurso. Georgi Miĥalkov prelegis pri la hungaraj Esperanto-verkistoj kaj poetoj. Li analizis la poezion de Kalmán Kalocsay, Julio Baghy, Lajos Tárkony, kaj aliaj. Li parolis pri la prozverkoj de Julio Baghy, Ferenc Szilagyi k. a. En la tria parto de la prelego li trarigardis la nuntempan hungaran Esperanto-prozon kaj la kreadon de István Nemere, Endre Tótn kaj Blazio Vaha.

Modelan lecionon kun lernantinoj de la gimnazio por la dua grado prezentis la kursgvidantino Natalia Ivanova — instruistino.

Al ĉiuj partoprenantoj en la programo kaj al la ĉefa respondeculino de „MARE'89” Markrid Karajan, la Estraro de „Albatroso” kore dankas pro ilia senlaca, sindona kaj abnegacia laboro.

Ek al la centjara jubileo!

Doc. Georgi DIMOV
Foto: Atanas GENKOV

TRADICIA RENKONTIĜO

La amikaj renkontiĝoj inter la membroj de la Literatura Rondo „Asen Grigorov” en Sofio kaj „Arta Klubo'84” en Plovdiv fariĝis tradicio. Jam kvinan fojon la verkistoj kaj poetoj prezentas siajn verkojn, interŝanĝas sperton kaj plifirmigas sian malnovan amikecon. Tio ne estas ordinaraj renkontiĝoj, sed siaspeca nobla konkurado, kiu instigas la partoprenantojn krei pli kaj pli bonkvalitajn verkojn. Ĝi estas ne nur agrabla kultura aranĝo kun riĉa, varia kaj interesa programo, sed ankaŭ altnivela fruktoĉona kunlaboro.

La solenaĵo okazis maje k. j. en la moderna E-kulturdomo en Plovdiv. Agrable salutis la gastojn kaj la ĉeestantojn la prezidanto de la Arta klubo en Plovdiv Atanas Krumov, esprimante sian ĝojon pro la bonegaj interrilatoj de la membroj de ambaŭ rondoj. Per varmaj vortoj li bondeziris sukcesan prezenton de la partoprenantoj kaj plifirmiĝon de tiu utila kunlaboro.

En la nomo de la literatura rondo „Asen Grigorov” el Sofio Cvetanka Kostova dankis al la organizantoj pro la invito kaj salutis ĉiujn per versaĵo de Penka Batoeva „La okuloj de l'patrinoj”, dediĉita al nia plej grava tasko — gardi la pacon kaj feliĉon de la homaro. Poetino Marija P. Angelova enmanigis al la prezidanto de plovdiva „Arta Klubo'84” sian versaĵon „Adreso”.

Antoaneta Atanasova (poetino) kaj Serafima Djatĉin (komponistino) gajnis la premion „An Okin” pri kantoj en la belartaj konkursoj de Universala Esperanto-Asocio en 1988 en Roterdamo. La kantoj estas „Epitafo” kaj „La sciuro”. Unue la tekston recitis la aŭtorino Antoaneta Atanasova kaj poste ni aŭdis du kantojn, belege plenumitajn de kantistino Ljudmila Koceva sŭb la akompanado de Serafima Djatĉin.

„La lasta printempo de la maljuna betulo” — rakonto de Stefan Sokolov estis tralegita de la aŭtoro mem.

Sekvis versaĵoj de nia tenera poeto Todor Ŝoŝev „Kara fora rememoro” kaj lia „Soneto”, kortuŝe plenumitaj de li mem. Kiel sciante en 1959 Ŝoŝev ricevis oran

medalon en Hispanio ĉe Internacia Literatura Konkurso. Krom tio li redaktas revuon por blindaj esperantistoj „Esperanta Fajrero” kaj dissendas ĝin al 31 landoj.

Fiero de la literatura rondo en Sofio estas nia estimata Nevena Nedelĉeva. Ŝin oni alte taksas ne nur en nia lando, sed ankaŭ eksterlande. Ŝia verkaro estas ampleksa, varia kaj altnivela. Ni aŭdis ŝian kortuŝan rakonton „Patrino”.

Maria Angelova, kies poeziaĵoj aperas ne nur en „Bulgara Esperantisto”, „Paco”, „Internacia Ĵurnalistiko” k. a., sed ankaŭ en eksaterlandaj kiel „Esperanto en Skotlando” kaj „Fonto”, prezentis iujn el siaj versaĵoj. Ili trasonis kiel alvoko al prudenta, libera kaj krea vivo. Per tio la programo de sofiaj gastoj finiĝis. Postsekvis duonhora programo de plovdivaj kolegoj.

Virina kantgrupo de „Arta Klubo'84” el Plovdiv gratulis la partoprenintojn kaj la publikon per kanto „Alvoko”, verkita de At. Krumov kaj komponita de doktorino Stefka Stamatova — membroj de la sama klubo.

Tre emocie dividis siajn karajn rememorojn pri siaj „Unuaj paŝoj en Esperanto” la maljuna laŭ aĝo, sed anime juna Anka Peĥlivanova. Eble ŝia grandega amo al Esperanto helpas ŝin konservi vigecon.

Poetino St. Stamatova kaj Lilia Sotirova arte recitis siajn proprajn verkojn „La kandelo” kaj „Adorado”.

Tre impresis kantis sian „Hungaran kanton pri la printempo” Eva Bojaĝieva.

„Mia piano” estas versaĵo de Ant. Atanasova el sofia Literatura Rondo kaj tre bone recitata de Slavka Sokolova el plovdiva „Arta Klubo”. Tiamaniere estis manifestita ankoraŭ pli klare la delonge ekzistanta krea amika kunlaboro de ambaŭ rondoj.

Kontentaj kaj admirigitaj de la belega programo la reprezentantoj de la du rondoj inspire dankis unu al la alia kaj eldiris sian sinceran deziron kaj strebon daŭrigi kaj pliprofundigi la imitindajn kunlaboron kaj amikecon. La konkludo estas: ju pli da bonaj amikaj renkontiĝoj, des pli da bonaj verkoj. Ni atendas ilin malpacience kiel pruvon de tiuj ĉi krea renkontiĝoj.

Cvetanka KOSTOVA

EN SCIENCA UNIVERSITATA REVUO

La revuo „Konfronta Lingvistiko” („Sâpostavitelno ezikoznanie” — eldonaĵo de Sofia Universitato) en sia kajero 6/1988 publikigis recenzon far la bulgara esperantologo Violin Oljanov pri la lasta libro de la sovetia interlingvisto prof. Sergej Kuznecov „Teoriaj fundamentoj de la interlingvistiko” (en rusa lingvo). Post kiam la aŭtoro de la recenzo donas pozitivan ĝeneralan pritakson al tiu verko, li esprimas opinion, ke „estus tre utile, se la libro de Kuznecov aperus en bulgara traduko”.

Ni rimarkigas, ke revuo „Konfronta Lingvistiko” duan fojon revenas al la temo pri Internacia Lingvo: Antaŭ du jaroj ĝi publikigis grandan artikolon de Violin Oljanov „Cent jarojn Esperanto”. Eble la Scienca E-Societo utiligos tiun ĉi pozitivan sperton.

40 JAROJN E-AGADO

La prezidanto de E-societo „Balkana Stelo” en Trojan, Lalju Lalev, fariĝis 60-jara.

L. Lalev naskiĝas en v. Berievo, distrikto de Gabrovo, lernas en sia naskiĝloko kaj en u. Sevlievo.

Lia granda amo fariĝas la internacia lingvo Esperanto. Per siaj noblaj celoj kaj ideoj ĝi simple „kaptas” la scivoleman junulon. Esperanton li eklernas en 1943 aŭtodidakte. Lalev gvidas E-kursojn en sia naskiĝvilaĝo kaj pli malfrue en Trojan.

De 1957 ĝis 1970 li estas prezidanto de la esperantista societo „Balkana Stelo” en Trojan. De 1973 ĝis 1987 li estas vicprezidanto kaj de 1988 — denove prezidanto de la societo. Li estas multajn jarojn membro de la DE de BEA en Loveĉ, kaj de 1980 — membro de la CE de BEA. De 1966 li estas UEA-delegito. Li partoprenas ĉiujn naciajn kongresojn de BEA ekde 1949. Lalev partoprenis ankaŭ kelkajn UK de Esperanto kaj aliajn internaciajn E-aranĝojn.

Li aktive laboras por organizado de ĉiuj E-aranĝoj

en Trojan kaj ĝia regiono. Lia nomo fariĝas simbolo de la E-agado en nia urbo kaj grandparte la sukcesoj de la E-movado en Trojan estas dank’ al lia fervora kaj abnegacia laboro. Pro sia aktiva E-agado, li estas distingita per la Ora Insigno de BEA.

L. Lalev dediĉis pli ol 40 jarojn el sia vivo al Esperanto. Starante ĉiam proksime al la problemoj, atente kaj afable, li estas vera ekzemplo de sindonemo al nia movado.

La trojanaj esperantistoj elkore gratulas sian karan prezidanton Lalju Lalev okaze de lia 60-jara jubileo kaj bondeziras al li multe da sano, feliĉo kaj sukcesoj en lia nobla agado sur la E-kampo!

Stelijana KAVRĀKOVA

VI Internacia Konferenco de KEK

De la 24-a ĝis la 27-a de aŭgusto 1989 en la bulgara apuddanuba urbo Ruse okazis VI Konferenco de la Komunista Esperantista Kolektivo (KEK). La 274 partoprenantoj venis el 11 landoj: Aŭstrio, Bulgario, Francio, GDR, Hispanio, Italio, Japanio, Jugoslavio, Sovetunio kaj Svislando. Plej multnombraj estis la partoprenantoj el la gastiganta lando kaj USSR.

Salutis la konferencon reprezentantoj de diversaj organizoj kaj eminentaj unuopuloj. Inter ili estis Nikola Gamazov, sekretario de Bulgara Komunista Partio en urbo Ruse. Oni aŭskultis prelegojn kaj raportojn pri la rolo de Esperanto por propagando de la ideoj de marksismo-leninismo, pri la celoj kaj agado de la Komunista Esperantista Kolektivo. En siaj eldiroj la konferencanoj parolis pri sia agado en la batalo por plifirmigo de la solidareco de la komunistoj-esperantistoj je la nomo de la homa progreso, kontraŭ faŝismo, por konstruo de eŭropa kaj monda domoj.

Estis faritaj modifoj en la statuto de KEK. La akceptita rezolucio skizas kia devas esti la estonta agado de KEK.

Nova prezidanto de KEK estas Haim Levi el Bulgario. En la estraro de la organizo estis elektitaj aktivaj komunistoj-esperantistoj el Aŭstrio, Bulgario, Italio, Svislando kaj USSR. La presorgano „Internaciisto” ekde 1990 aperados en Sovetunio. La konferenco sendis saluttelegramojn al la partiaj gvidantoj: Miĥail Gorbaĉov (USSR), Todor Ĵivkov (Bulgario) kaj Franc Muri (Aŭstrio).

La konferencanoj vizitis uzinon produktantan elektromaterialojn, promenis per ŝipo laŭ Danubo, kaj parto el ili partoprenis tutagan ekskurson al urbo Veliko Târnovo, kiu estis iama ĉefurbo de Bulgario.

La partoprenantoj en la konferenco loĝis, manĝis, kunsidis, diskutis kaj amuziĝis en la granda komplekso-parko de la Supera Lernejo „Angel Kânĉev”. Ĝi tre konvenas por tiaspecaj aranĝoj.


Dum la konferencaj tagoj estis ekspoziciitaj multe da materialoj pri la agado de KEK kaj esperantistaj korespondadoj de membroj de la societo „Libero” en urbo Ruse.

En la libro-servo oni havis eblecon aĉeti multe da Esperantaj libroj k. a. esperantaĵojn. Plej multe vendiĝis la provnumero en Esperanto de ĵurnalo „Moskvaj Novaĵoj”. Al ĝia ĉefredaktoro oni sendis gratulleteron, kiun subskribis ĉiuj konferencanoj.

La VI Konferenco de la komunistoj-esperantistoj estas grava evento en la agado por popularigo de la marks-leninaj ideoj per Esperanto kaj por disvastigo de Esperanto en komunistaj medioj.

Nikola NIKOLOV

La 11-an de junio k. j. en Estonio solene oni malfermis memorŝtonon omaĝe al fratinoj esperantistinoj Helmi kaj Hilda Dresen. Hilda Dresen (1896—1981) estis internacie konata E-poetino kaj tradukistino.



Deziras korespondi

BULGARIO

KUNKA DUHOVNIKOVA (35-jara inĝenierino) — 1618 Sofio, bul. „La 9-a de septembro“ 128, bl. 7 — kun ĉl pri ĉt.

Familio VESELA kaj IVAN DIMITROV (45-jaraj) — 1231 Sofio, ĵ. k. „Svoboda“, bl. 12, vĥ. II — kun ĉl pri ĉt.

JORDANKA ARNAUDOVA (juristino) — 1421 Sofio, ul. „Krivolak“ 2 — kun ĉl pri ĉt.

ENJU MARTINOV (16-jara) — 7900 Omurtag, ul. „Dunav“ 14 A — kun ĉl pri ĉt.

GEORGI PAVLOV (34-jara fervojisto) — 7800 Popovo, ul. „Rakovska“ 4 — kun ĉl pri ĉt, kolektas bk, pm, kalendaretojn.

HUNGARIO

JUDIT BERTA (18-jara) — H-6000 Kecskemét, Kristály tér 4 — kun ĉl pri ĉt.

ALEKSANDRO KIRÁLY (30-jara) — Hódmezővásárhely, Rákóczi strato 87 — kun ĉl pri ĉt.

POLLANDO

ILONA PLONKA (37-jara instruistino) — PL-91-852 Łódź, ul. Inflancka 31 m 104 — kun ĉl pri literaturo, muziko, kolektas pm.

MAGDALENA CHWEDCZUK-POPKO (25-jara instruistino) — PL-20-829 Lublin, Wola Ślawińska 18 — kun ĉl pri modo, literaturo, fotado, kolektas bk, diapozitivojn.

MAREK RYCZEK (27-jara inĝeniero) — PL-31-832 Kraków, oś. Jagiellońskie 3/85 — kun ĉl pri turismo, historio, literaturo kaj religioj.

DOROTA MACZKA (25-jara) — PL-08-110 Siedlce, ul. Młynarska 22/28 — kun ĉl pri turismo, historio,

literaturo.

BARBARA KREFFT (25-jara) — PL-10-080 Olsztyn, ul. Profesorska 5/17 — kun ĉl pri muziko, literaturo, vojaĝoj.

BOŻENA KORCZAKOWSKA (27-jara instruistino) — PL-10-730 Olsztyn, Kortowo 10/210 — kun ĉl pri turismo, literaturo.

ANDRZEJ MAZUREK (32-jara oficisto) — PL-08-110 Siedlce, ul. Chrobrego 15/44 — kun ĉl pri turismo, literaturo, historio kaj muziko.

SOVETUNIO

ELENA SUBAKOVA (21-jara) — SU-309670 Belgorodskaja reg., Volokonovskij dist., v. Jutanovka, ul. Nadreĉnaja 45 — kun ĉl pri literaturo, muziko, kolektas pm, bk.

MIKAELO SAAKJANC (26-jara) — SU-229700 Liepaja, ul. Pasta 12-23, Latva SSR — kun ĉl pri muziko, psikologio, lingvoj, vojaĝado.

IVAN SUDAS (32-jara elektroteknikisto) — SU-246050 Gomel, klubo „Konkordo“, a/k 99, Belorusio — kun ĉl pri ĉt, kolektas bk.

VLADIMIR VINOGRADOV (studento) — SU-700167 Taŝkento, ul. Zeljonaja 38 — kun bulgaraj esperantistoj pri literaturo, tekniko, naturo, lingvoj, E-movado.

NOVAJ ESPERANTISTOJ (15-60-jaraj) — adreso de la grupgvidanto SU-236017 Kaliningrad, ul. Lesoparkovaja 38^a-25, Gluĥov Aleksandro — kun ĉl pri ĉt.

VJETNAMIO

PHAN KIM VIỆT — 191 Lê Thánh Tôn, T. X. Tuy Hòa — Phú Jên — kun ĉl pri Esperanto, historio, kolektas pm.

FILATELO

Okaze de la monda remkonkurso organizita en Plovdiv (Bulgario) en 1989 Asocio „Komunikado“ emisiis la 11-an de aŭgusto 1989 du poŝtmarkojn je valoro 13 kaj 30 stotinkoj.

Aŭtoro de la projekto estas la pentristo Dimităr Taŝev.

Formato de la pm: 25 × 40 mm (vertikale)

Tekniko de la presado: ofseto.

Eldonkvanto: 13 st. —

1 600 000 ek-

zempleroj

30 st. —

1 200 000 ek-

zempleroj

Presejo: Ŝtata presejo de la komunikado-Sofio.

Draguŝko PETROV

КАНУ КАЯК ПЛОВДИВ



Д. ТАШЕВ 89.

КАНУ КАЯК ПЛОВДИВ



Д. ТАШЕВ 89.



Distroj

PRI KIO RIDAS ESPERANTISTOJ

La profesoro: — Karlo, kio estas Esperanto-sinonimo?

— Tio estas Esperanta vorto, kiun ni uzas anstataŭ tiu, pri kiu ni ne scias la regulan ortografion.

* * *

La lektoro: — Veku la kursanon, kiu dormas apud vi.

La kursano: — Vi devas tion fari lektoro, ĉar vi lin dormigis per via enua instruado de Esperanto.

* * *

— Mi aŭdis, ke estas ankau inkognitaj geesperantistoj. Kiuj povas ili esti?

— Tiuj samideanoj, kiuj nek portas verdstelan insignon, nek emas paroli Esperanton en nia medio.

* * *

— Ĉu plaĉas al vi la proverbon „Hundo bojas, Esperanto vojas“?

— Jes, sed kondiĉe, ke oni ne forgesu bastonbati la hundon.

* * *

— Mi deziras esti ĉiĉeronino en la oficejo „Esperantoturist“?

— Sed vi ja diris, ke Esperanton vi ne parolas. Kiamaŭniere vi interriltas al niaj eksterlandaj klientoj?

— Mi tre bone interkompreniĝas kun alilandanoj per ridetoj kaj gestoj.

Nikola NIKOLOV




— Miaj intencoj estas seriozaj, kredu min. Mi proponas al vi seriozan amon dum la daŭro de la tuta kongreso.

MAGIA ENIGMO

Horizontale kaj vertikale:

1. Poemlibro de W. Auld, J. S. Dinwoodie, J. Francis kaj R. Rossetti.
2. Bonodoro.
3. Granda tre venena serpento.
4. Granda dekrura mara kankro.
5. Helena dio de la suno, arto kaj beleco.

Cvetan MANOJLOV



Noto de la redakcio. Ni atendas viajn respondojn ĝis la 15-a de januaro 1990. La solvo estos publikigita en n-ro 3/1990.

LA PREMIO

Ĝis la difinita limdato en la Redakcion venis pli ol 20 leteroj kun solvoj de la publikigita en n-ro 7/89 de „BE“ Magia enigmo. Dankon!

Post lotumado la libropremion — „Mia vivo“ de Trifon Hristovski, ricevas Ŝiŝman Boĉev el Sofio. Gratulon!

Solvo:

- Horizontale kaj vertikale: 1. Jubileo. 2. Bario. 3. Mirtelo. 4. Lieĝo. 5. Geologo.

„BE“

ENKETO

Karaj samideanoj.

Jam alproksimiĝas laŭvica kongreso de nia Asocio. Okaze de tio en n-ro 10/89 de „Bulgara Esperantisto” la Redakcio komencis novan rubrikon „Antaŭ 42-a Kongreso de BEA”. Sub tiu titolo ni aperigas viajn opiniojn kaj proponojn rilate BEA-agadon, strukturon k. s. Viaj leteroj kaj artikoloj estos ne nur publikigataj, sed profunde pridiskutataj dum la kongrespreparo.

Tiamaniere vi povus partopreni la antaŭkongresan laboron, por ke la plej alta forumo de la bulgara esperantistaro estu pli bone organizita kaj laboru pli aferece kaj fruktodone.

Tiel ankaŭ vi uzos la potencon de la asocia organo kiel organizanto de nia movado.

Por faciligi vin, la Redakcio proponas al via atento enketon. La dezirantoj respondi al la demandoj povas fari tion ne pli malfrue ol la fino de marto 1990.

Fine, ne prokrastu viajn respondojn. Jen la demandoj:

1. Kia estas la stato de E-movado en via loĝloko kaj ĉu tiu stato ŝanĝiĝis post la Plenkunsido de CE de BEA (16.01.1988).
2. Ĉu la ligoj inter via societo kaj CE de BEA estas bonfunkciaj?
3. Viaj opinioj kaj proponoj pri la tuta agado de BEA kaj de ĝiaj fakoj?
4. Kiujn demandojn laŭ vi devas trakti la kongreso?

Anticipajn dankojn pro viaj leteroj.

„BE”